

El Popola Ĉinio

人民中國報道



PEKINO 2 1 9 6 0

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO - LIGO

VERDA VOJO
FRANCA PARIZI
LIGO



La Popola Halo

Foto de Lan Kong

La Grandioza Signifo de 3-jare Plifrua Plenumiĝo de l' Dua Kvinjara Plano

EN 1959, je 3 jaroj pli frue, estas atingitaj la ĉefaj celoj de la 2-a KJP, kiun prezentis en sept. 1956, la Oka Tutlanda Kongreso de la Ĉina Komunista Partio kaj akceptis la Ŝtata Konsilantaro en feb. 1957. Laŭ la origina plano la totala produktvaloro de industrio kaj agrikulturo en 1962, devus kreski je ĉ. 75% pli kompare kun tiu en 1957. En tio la totala produktvaloro de industrio devus kreski je ĉ. unuoblo pli kaj de agrikulturo ĉ. 35%, kompare kun tiu en 1957, respektive. La rezulto de plenumado montris, ke la totala produktvaloro de industrio kaj agrikulturo en 1959 jam kreskis je 94.4% kompare kun tiu en 1957, la produktvaloro de industrio je 131.5% kaj de agrikulturo je 45.8%, respektive. Sur la bazo

de altrapida disvolviĝo de industria kaj agrikultura produktado, la nacia enspezo kreskis je 62.86% anstataŭ la origina plano de ĉ. 50%. La pli frua plenumo de la 2-a KJP en la totala produktvaloro de industrio kaj agrikulturo kaj en nacia enspezo montras, ke la ĝenerala evolua nivelo de la socia produktado jam nun atingis la celon en nur du jaroj anstataŭ kvin kiel origine planite.

La produkto-kvantoj de ĉefaj produktaĵoj alproksimiĝis al tiuj de Britio

EN produktokvanto de ĉefaj produktaĵoj, laŭ la unuapaŝa statistiko de la Ŝtata Statistika Oficejo, 13 el la 24 jam atingis aŭ superis la celon origine difinitan de la 2-a KJP, ili estas: ŝtalo, karbo, elektro, metalurgiaj ekipaĵoj, elektroproduktaj ekipaĵoj, metaltranĉaj maŝinoj, ligno, kotonŝpinaĵo, kottona ŝtofo, salo, maŝinfarita papero, greno kaj kotono. El la 11 ceteraj, kiuj ne atingis la difinitan celon, cemento kaj sojfabo jam proksimiĝis al la celo, kaj la aliaj, kvankam ne atingis la celon, tamen laŭ la rapideco de kreskado ankaŭ multe superis la originan planon.

La pli frua plenumiĝo de la 2-a KJP ne nur multe mallongigis la distancon de la produktokvantoj de ĉefaj produktaĵoj inter Ĉinio kaj Britio, sed ankaŭ rezultigis ke certaj produktaĵoj niaj jam superis tiujn de Britio en produkta nivelo. En 1957, en kiu la C. K. de la Partio elmetis la devizon kuratingi Brition en la produktokvanto de ĉefaj produktaĵoj en ĉ. 15 jaroj, la produkto de ŝtalo de nia lando estis nur 24.3% de tiu de Britio, de gisaĵo 40.8% kaj de karbo 57.2%, respektive. Pasis nur du jaroj, nia ŝtalprodukto jam kreskis ĝis 66% de tiu de Britio, kaj en produktokvanto de gisaĵoj kaj karbo ni jam longe postlasis tiun malnovan imperiisman landon. Estas vere ke la produktokvantoj de certaj ĉefaj produktaĵoj de nia lando ankoraŭ ne kuratingis tiujn de Britio, sed la tendenco de la evoluo en la lastaj du jaroj jam klare montris, ke la tempo por atingi kaj superi Brition en produktokvantoj de la ĉefaj produktaĵoj certe venos ankoraŭ pli frue ol origine imagite.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 2 (59) 1960

Bildo sur la kovrilo — Ĉirkaŭ Prezidanto Maŭ
(Novjara bildo de Liu Tian-hi)

La grandioza signifo de 3-jare Plifrua Plenumiĝo de l' Dua Kvinjara Plano

La popola komunumo — granda liberiganto de produktopovo

Grandioza projekto efektivigata

La Popola Halo

La brilo de Ĉinio-Birma Amikeco

En granda familio de revenintaj elmigrintoj

Rememoroj pri mia iro al kamparo

Hejmon revenis arto

La plej bona verso

Survoje al malgrandaj altfornoj


Esperanto marŝas

Bildo sur la dorsa kovrilo — Printempo
Venas al la Kamparo (Ĉinstila pentraĵo de Lu Ji-fei)


La Totala Valoro Produktita de Industrio kaj Agrikulturo

La ciferoj de 1962 estas la cel-ciferoj de la 2-a KJP.


La Totala Valoro Produktita de Industrio



La Totala Valoro Produktita de Agrikulturo



Nacia Enspezo



Pli harmonias la plej fundamenta proporcio de nia nacia ekonomio

LA altrapida disvolviĝo de nacia ekonomio estas komuna leĝo de ĉiuj socialismaj landoj, kaj ankaŭ tiu de niaj 1-a kaj 2-a KJP. Sed la alta rapideco de nia 1-a KJP estis ankoraŭ ne rapideco de antaŭensaltego. Tion kaŭzis ne nur ke, tiutempe, nia industria fundamento estis ankoraŭ tre malforta, la materiaj kondiĉoj por antaŭensalto ne sufiĉaj, sed, pli grave, ke en la pliparto de tiu periodo nia lando ankoraŭ troviĝis sub kondiĉoj de socialisma reformado kaj estis ankoraŭ ne plenumitaj la taskoj de socialisma revolucio, kaj tio ne povas ne influi la aktivecon de la popolamasoj en produktado. Nur en 1956, sekve de tio ke la socialisma reformado de agrikulturo, metioj kaj kapitalismaj industrio kaj komerco estis fundamente plenumita, kaj precipe post la batalo kontraŭ la dekstruloj en 1957, la socialisma revolucio de nia lando akiris definitivon venkon, ne nur en ekonomia fronto, sed ankaŭ en politika kaj ideologia frontoj, la produkta aktiveco de la popolamasoj komencis plene disvolviĝi. Sub tiuj kondiĉoj la C.K. de 1' Partio kaj K-do Maŭ Ze-dong ĝustatempe elmetis plie la Ĝeneralan Linion de konstruado de socialismo, kaj tio rezultigis la daŭran antaŭensaltegon en la du jaroj. El tio evidentiĝas ke la Ĝenerala Linio estis la plej baza movforto de la antaŭensaltego. La pli frua plenumiĝo de la 2-a KJP ankoraŭ pli forte heligas la brilojn de la Ĝenerala Linio kaj pli profunden enigis ĝian penson en la homajn korojn, tiel ke estas metita la bazo por daŭra antaŭensaltado de nia socialisma konstruado en estonteco, politike kaj ideologie.

La plifrua plenumiĝo de la 2-a KJP estas ankaŭ venko de la vojo de nia industriigo, montrita de K-do Maŭ Ze-dong. Li diris en sia "Problemo pri ĝusta traktado de internaj kontraŭdiroj inter la popolo":

"..... La problemo de la vojo de industriigo koncernas ĉefe la problemon de la interrilatoj de disvolviĝo de peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo. La peza industrio estas la centro de nia ekonomia konstruado — tio devas esti certigata. Sed samtempe oni devas doni sufiĉan atenton al disvolvado de malpeza industrio kaj agrikulturo." En la lastaj du jaroj, la socialisma konstruado de nia lando ĝuste antaŭeniris laŭ la vojo de li montrita. La kontinuaj antaŭensaltegoj en la du jaroj okulfrappe plifortigis la materian kaj teknikan fundamenton por industriigo de nia lando. Ĝi montriĝis ne nur en flugrapida kreskado de pezindustriaj produktaĵoj, samtempe ankaŭ en pliboniĝo de la proporcio de disvolviĝo inter industrio kaj agrikulturo kaj inter peza kaj malpeza industrioj.



Koncerne al la disvolviĝo de peza industrio, sub la direkto de "antaŭensalto ĉiufanka kun ŝtalo kiel akso", preskaŭ ĉiuj pezindustriaj produktaĵoj kreskis je pli ol unuoblo en la lastaj du jaroj, kiel ekzemple: ŝtalo kreskis je 1.5-oblo, gisajo 2.45-oblo, karbo 1.68-oblo, elektro 1.15-oblo, kruda petrolo 1.54-oblo, metaltranĉaj maŝinoj 1.5-oblo, kemiaj sterkoj 1.1-oblo ktp. La flugrapida disvolviĝo de nia peza industrio montriĝis ne nur en kvanto, sed ankaŭ en leviĝo de kvalito. Nun nia maŝinkonstrua industrio jam povas produkti multope pezajn maŝinojn kaj ekipaĵojn, kiaj 1513-kubmetraj altfornoj, 2500-tunaj hidraŭlikaj premiloj, termoelektraj ekipaĵoj kun produkta kapacito de 50,000 kilovatoj, hidroelektraj ekipaĵoj kun produkta kapacito de 72,500 kilovatoj, aŭtomobiloj, aeroplanoj, traktoroj kaj altefikaj lokomotivoj. La specaro de ŝtalaj produktoj jam nombriĝas pli ol 6,000. La memproviza proporcio de la du plej gravaj produktaĵoj rimedoj, maŝinoj-ekipaĵoj kaj ŝtalaj produktoj, nun jam superis 80%. Tia flugrapida disvolviĝo de nia peza industrio tre multe fortigis la materian bazon por plivastigita reproduktado, kaj por teknika re-

formo de nacia ekonomio, antaŭ ĉio por tiu de agrikulturo. Laŭ statistiko, sekve de antaŭensaltigo de peza industrio, ŝtalaj produktoj liveritaj de la ŝtato al agrikulturo dum la lastaj du jaroj estis sume pli multaj ol dum la tuta periodo de la 1-a KJP. La forĉerpaj kaj irigaciaj maŝinoj, traktoroj, rikoltaj kombajnoj kaj ŝarĝaŭtomobiloj, liveritaj de la ŝtato multe superis la kvanton de tiuj liveritaj dum la unua jarkvino. Kaj nun sub la kondiĉoj de plifortigita kaj ankoraŭ daŭre fortigata fundamento de industriigo ni povas pli rapide kaj pli bone antaŭen puŝi la teknikan reformadon de la nacia ekonomio, kaj antaŭ ĉio tiun de agrikulturo, por ke pli rapide stariĝu nia agrikulturo sur la bazo de moderna tekniko kaj pli rapide leviĝu ĝia laborproduktiveco.

Koncerne al la rilatoj de disvolviĝado inter peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo, sub la direkto de samtempa disvolvado de industrio kaj agrikulturo kaj samtempa disvolvado de peza kaj malpeza industrioj, alprenita de la Partio, jam rimarkinde pli boniĝis ambaŭ la proporcio de disvolviĝo inter industrio kaj agrikulturo kaj tiu inter peza kaj malpeza industrioj. Rilate al la proporcio inter industrio kaj agrikulturo, dum la periodo de la 1-a KJP la meznombra rapideco de kresko de nia industrio estis 18%, tiu de agrikulturo 4.5%, kaj la proporcio de rapideco de kreskado inter industrio kaj agrikulturo estis 4:1; dume, en la pasintaj du jaroj, tiu de industrio estis 52.2%, de agrikulturo 20.8% kaj la proporcio reduktiĝis al 2.5 : 1. Tia reĝustigo de la proporcio de disvolviĝo inter industrio kaj agrikulturo estas konforma al nia aktuala ekonomia stato. Rilate al la proporcio inter peza kaj malpeza industrioj, dum la periodo de la 1-a KJP la meznombra rapideco de kreskado de nia peza industrio estis 25.4%, tiu de

malpeza industrio 12.8% kaj la proporcio de rapideco de kreskado inter peza kaj malpeza industrioj estis 1.98 : 1 ; en 1958, sekve de tio ke peza industrio antaŭensaltis en rapideco pli elstare sur la bazo de samtempa antaŭensaltado de peza kaj malpeza industrioj, pligrandiĝis la proporcio de disvolviĝo inter peza kaj malpeza industrioj, kaj en 1959, la rapideco de kreskado de peza industrio estis 43.3%, tiu de malpeza industrio 34%, kaj la proporcio reduktiĝis ĝis 1.27 : 1 . Tia reĝustigo de la proporcio de disvolviĝo inter peza kaj malpeza industrioj estas ankaŭ necesa.

Post la dujara daŭra antaŭensaltado estas superplenumita la origina kvinjara plano en la totalaj produktvaloroj ambaŭ de industrio kaj agrikulturo, kaj estas superitaj ankaŭ ĉiuj ĝiaj 4 ĉefaj celitaj ciferoj por ŝtalo, karbo, greno kaj kotono, kiuj havas plej decidigan signifon por ĉiuflanka antaŭensalto de nacia ekonomio. Tio estas la rezulto de plena efektiviĝo de la direkto de "irado per du kruoj", kaj antaŭ ĉio de la direkto de samtempa entrepreno de industrio kaj agrikulturo, kaj de plena efektiviĝo de la direkto bazi la tutan nacian ekonomion sur agrikulturo kaj kombini la disvolvado de peza industrio en la unua vico kun la disvolvado de agrikulturo en alta rapideco. Nun la proporcio rilato inter niaj peza industrio, malpeza industrio kaj agrikulturo estas pli harmonia ol en iu ajn historia periodo de nia lando, same ankaŭ inter la du grandaj subdividoj: produktado de produktaj rimedoj kaj produktado de konsumaj rimedoj. Kaj tiuj proporcioj rilatoj estas ĝuste la plej fundamentaj en nacia ekonomio, kies solviĝo kreis plej favorajn kondiĉojn por disvolviĝo de la tuta nacia ekonomio ne nur altrapida, sed ankaŭ laŭproporcio en la venontaj jaroj.





Disflorado de entreprenoj tra la tuta lando

EN la pli frua plenumiĝo de la 2-a KJP, tre gravan rolon ludis mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj starigitaj de lokaj instancoj, produktantaj laŭ kombinitaj moderna kaj indiĝena metodoj. La fakto pruvis ke la direkto de la Partio, samtempa entreprenado de industrioj administrataj de la centra kaj lokaj registaroj, samtempa entreprenado de industrioj de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj tipoj kaj samtempa entreprenado de produktado laŭ procedoj modernaj kaj indiĝenaj, estas direkto marksisma kaj la sola ĝusta direkto por altigi la rapidecon de nia socialisma konstruado. La mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj, kiuj konstruiĝis grandkvante dum la granda antaŭensaltego, ne nur havas grandan meriton en plifruigo de plenumiĝo de la 2-a KJP, sed ankaŭ profundan kaj longdaŭran signifon strategian por rapidigi la socialisman konstruadon en nia lando.

Por la celo laste nomita estas necese, krom konstrui grandajn entreprenojn administratajn de la centra registaro kaj aplikantajn ĉefe modernajn procedojn, konstrui ankaŭ grandnombre mezgrandajn kaj malgrandajn entreprenojn, administratajn de lokaj registaroj kaj aplikantajn ĉefe simplajn procedojn en produktado." Grandaj, modernaj, multnombraj"* estas skeleto de industriigo, sed devas esti plene priatentata la starigo de "malgrandaj, modernaj, multnombraj"* kaj "malgrandaj, indiĝenaj, multnombraj"*, samtempe. Laŭ tiu direkto en la pasintaj du jaroj, ni konstruis ĉiujare krom pli ol mil konstruunuojn supernormajn, samtempe ankaŭ dekmiloj da subnormaj. Koncerne al industrio, ĝis nun tra la tuta lando

el la konstruitaj kaj funkciantaj mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj, estas pli ol mil ferŝtalaj fabrikoj, pli ol 17,000 karbominejoj, elektraj centraloj kun suma kapacito de pli ol 500,000 kilovatoj, pli ol 400 petrol-rafinejoj kaj pli ol 100 cementfabrikoj. Krom tiuj estas ankoraŭ miloj da maŝinaj, kemisterkaj kaj malpezindustriaj fabrikoj. Tiuj mezgrandaj kaj malgrandaj fabrikoj dise lokiĝas en ĉiuj anguloj de la lando, tiel ke industrio estas starigita tie kie antaŭe ne estis, estas fortigita tie kie antaŭe estis malforta industria bazo, kaj estas plue evoluigita tie kie antaŭe estis pli bona industria bazo. Tiamaniere, estas metita bona fundamento de racia geografia dislokigo de industrioj en nia lando. Ĉar plejparte el tiuj entreprenoj estas starigitaj en vilaĝoj, mezgrandaj kaj malgrandaj urboj havas intiman ligitcon kun disvolvado de agrikulturo kaj socialisma reformado de vilaĝoj, kaj tre granda parto el ili estas konstruita ĝuste por subteni agrikulturon, tial, la vasta disvolviĝo de tiaj entreprenoj certe havos ĉiam pli okulfrapan influon por akceli intiman interligon de industrio kaj agrikulturo, por akceli pluan proksimigon de urboj kaj vilaĝoj kaj por plifortigi la aliancon inter laboristoj kaj kamparanoj.

La disflorado de mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj tra la tuta lando havas ekstreme gravan signifon por plirapidigi nian socialisman industriigon. En nia nuna industria produktado, la produkta kvanto de la "malgrandaj, modernaj, multnombraj" okupas tre grandan pozicion, ekzemple, en la jaro 1959, pli ol duono de gisaja produkto, pli ol triono de ŝtalo kaj 40% de karbo estis produktitaj de mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj. La graveco ne kuŝas sole en ilia grava pozicio en la nuna produkto, sed precipe en tio ke dank' al la ekzisto de ĉi tiuj mezgrandaj



kaj malgrandaj entreprenoj vaste dislokigitaj tra la tuta lando, estas metita fundamento por daŭra antaŭensaltado en la venontaj jaroj.

La popola komunumo, plej bona organizformo por antaŭensaltado de agrikultura produkto

LA pli frua plenumiĝo de la 2-a KJP estas ne apartigebla kun la starigo, firmigo kaj disvolvado de la popola komunumo. La altrapida disvolviĝo de nacia ekonomio postulas organizan formon konforman al la rapideco de la disvolvado, kaj la popola komunumo estas ĝuste la plej bona organizformo por efektiviĝi antaŭensaltadon de agrikultura produkto, kaj ankaŭ tiu por stimuli la antaŭensaltadon de industrio pere de agrikulturo.

La granda antaŭensalto naskis la popolan komunumon, kaj la firmigo kaj disvolvado de la lasta, returne, akcelas la antaŭan. La du jaroj, en kiuj la popolkomunuma movado akiris grandiozan venkon, estis ankaŭ la jaroj en nia historio, en kiuj plej rapide disvolviĝis la produktado de niaj industrio kaj agrikulturo, kaj precipe de la lasta. De 1950 ĝis 1957 la meznombra jara kresko de nia industria produkto estis 24%, de agrikulturo 8%; en 1958 kaj 1959 ili estis 52.2% kaj 20.8%, respektive. Speciale notinde estas tio, ke la alta rapideco de kreskado de nia agrikulturo en 1959 estis akirita sub kondiĉoj de pezaj naturkatastrofoj ne renkontitaj dum la lastaj kelkdek jaroj. En tio estas ankaŭ pruvite plue ke la popola komunumo havas pli da superecoj ol la altgrada kooperativo.

La popola komunumo ne nur estas la plej bona organizformo por plene efektiviĝi la "okvortan konstitucion",[†] venki naturajn katastrofojn kaj realigi la agrikulturan antaŭensaltadon, sed ankaŭ por organizi ĉiuf flankan antaŭensaltadon de entreprenado de

agrikulturo, forstado, bestbredado, flankokupoj kaj fiŝado kaj por realigi la industriigon de la popolkomunumo. Post la reordigo kaj plifirmigo en 1959 la popola komunumo jam surpaŝis sian vojon de sana disvolviĝo, kaj certe ludos des pli gravan historian rolon en la grandioza tasko realigi la modernigon de industrio, agrikulturo kaj scienco-kulturo de nia lando.

La plifrua efektiviĝo de la ĉefaj celoj de la 2-a KJP markas ke la distanco, kiu estas finirota en nia socialisma konstruado laŭ la origina plano en kvin jaroj, estas finirita jam nur en du jaroj. Nun nia socialisma konstruado sin trovas en nova etapo, kies ĉefa enhavo estas: sur la bazo de daŭra antaŭensaltado batali por realigi en pli mallonga tempo la alvokon elmetitan de la 8-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio, kuratingi Brition en 10 jaroj en produktokvanto de ĉefaj industriaj produktaĵoj, kaj, samtempe, ankaŭ realigi en pli mallonga tempo la programon de agrikultura disvolvado, origine destinita por realigi en 1967. La Ĝenerala Linio, la antaŭensaltado kaj la popola komunumo estas la tri ĉionpovaj mirindaĵoj, kaj serio da direktoj de "irado per du kruroj" estas fundamenta rimedo, por realigi la grandiozan celon. Ni disponas ĉiujn necesajn kondiĉojn por realigi la celon. Se nur ni tenos firme la standardojn de la Ĝenerala Linio, la antaŭensaltado kaj la popola komunumo, sub gvidado de nia Partia Centro kaj K-do Maŭ Ze-dong, kaj persistos je la direkto de "irado per du kruroj", nia popolo certe povos plenumi ĉi tiun grandiozan historian taskon.

* *Temas pri tipo, produkta procedo kaj nombro de entreprenoj respektive.*

† *Temas pri ok ĉefaj rimedoj en agrikulturo: grundo (plibonigo), sterko (-pliigo), akvo (-utiligo kaj irigacio), semo (-plibonigo), densa (plantado konvene), protekto (de plantaĵoj), mastrumado (en la kampo), ilo (-renovigo).*

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

Fosilio de Maba-homo malkovriĝis

La fosilioj de Maba-homo kaj animaloj estas elfositaj de Guang-dong-a Muzeo el kalkŝtona kaverno ĉe Ŝizi-monto en Maba, Ŝaŭguan.

Post studado fare de specialistoj, estas konstatite, ke la fosilioj de homaj kapostoj estas de homo, kiu vivis antaŭ 2-300 mil jaroj. Inter la trovitaj fosilioj ili estas el la plej malproksima antikveco post tiu de Ĉina Simio-homo (*Sinanthropus Pekinensis*) elfosita en Ĝoukouĉian.

Tio montras, ke fine de la meza epoko aŭ komence de posta epoko de pleistoceno vivis prahomoj ne nur en norda Ĉinio, sed ankaŭ en la Sudo, kaj pli grava signifo troviĝas en tio ke ĝi liveras tre gravan materialon al la formiĝanta teoria sistemo de arkeologio de nia lando.

Du abelreĝinoj en unu abelujo

"La abeloj ne toleras du reĝinojn." Pri tio neniu dubis. Ĉar kunesto de du reĝinoj ne eviteble kaŭzas batalon, amasmorton kaj eĉ disflugon.

Nun la aserton malvalidigis la abelbredistoj de Longgiang-a Popolkomunumo en Vugang de Hunan-provinco. Ili sukcesis trovi rimedon por loĝigi samtempe du abelreĝinojn en unu abelujo post multfoja eksperimentado por naski pli multe da idoj ol unu abelreĝino, kaj ankaŭ metodon por eviti amaseskapon kaj revenigi la forflugintajn abelojn. Tio ĉi multe kontribuas al disvolvado de abelkulturado. Tiu ĉi popolkomunumo havis en 1957 nur pli ol 50 kestojn da abeloj kaj nun havas jam pli ol 400.

La popola komunumo — granda liberiganto de produktopovo

— Enketo pri la akcelo de agrikultura mekanikigo en la Ĉanggiang-a Popola Komunumo —

PASIS nur unu jaro post la fondiĝo de la Ĉanggiang-a Popola Komunumo, Giangning-gubernio, Giangsu-provinco sed jam montriĝis la pli granda supereco de la popola komunumo super la agrikultura produkta kooperativo en plirapidigo de la agrikultura mekanikigo. “La popola komunumo aldonis al ni flugilojn!” asertis la komunumanoj.

Motorzumado en matenruĝo apud rivero

La Ĉanggiang-a Popola Komunumo organiziĝis el dek ses altgradaj agrikulturaj kooperativoj havantaj 85,413 muojn da tero. La anaro nombras 36,157 personojn konsistigantajn 8,904 familiojn. Antaŭ la Liberiĝo, tiu ĉi loko estis fame konata kiel “akvuĝejo” aŭ “malriĉulejo”. En ĉiuj tri jaroj okazis meznombro unu rompiĝo de digoj kaj du pluv inundoj. Pro manko de laborforto tri dekonoj de la kampoj restis dezertaj. Depost la Liberiĝo ĝis la starigo de malaltgradaj kooperativoj, la produktaj kondiĉoj kaj ekonomia vivo de la loko multe boniĝis. Sed ĉiu laborpova persono ankoraŭ devis prizorgi pli ol naŭ muojn da tero kaj la minaco de pluv-inundado ankoraŭ restis sufiĉe serioza. La loĝantoj ege deziris senprokrastan ŝanĝon de tia situacio kaj forte aspiris al la efektivigo de agrikultura mekanikigo. La kooperativanoj ofte diris: “Kiel kontentaj ni estus eĉ sen manĝoj dum tri tagoj, se ni povus ĉerpi akvon per ‘feraj drakoj’ kaj kulturi teron per ‘feraj bovoj’!” “Kiam la altgradaj kooperativoj estis fonditaj, la ŝtato disponigis ses traktorojn al la pli granda Ĉanggiang-a Altgrada Kooperativo, kaj kelkaj aliaj kooperativoj aĉetis pumpmaŝinojn. Sed pro la limigoj de la objektivaj kondiĉoj ke la kooperativoj estis malgrandaj en skalo kaj ilia forto ne sufiĉa, la antaŭeniĝo de agrikultura mekanikigo estis ankoraŭ malrapida. La areo de la kampoj irigaciataj per maŝinoj en la dek ses kooperativoj ampleksis nur 1,400 muojn kaj la areo de la kampoj kulturataj per maŝinoj, nur iom pli ol 3,900 muojn. Post la fondiĝo de la popola komunumo, la dumlonga aspiro de la kooperativanoj finfine efektiviĝis. Dum la pasinta jaro la agrikultura mekanikigo antaŭeniĝis kiel aglo fluganta kun plene etenditaj flugiloj. La areo de la kampoj irigaciataj per maŝinoj en la tuta popolkomunumo estis 34 oblojn pli granda ol antaŭe, nome 80%

de la kampoj estis irigaciataj per maŝinoj. En la aŭtuna plugado de 1959, pli ol duono de la 38,500 muoj da sekaj kampoj estis kulturataj per traktoroj. Nuntempe la komunumo jam posedas 12 traktorojn, 55 pumpmaŝinojn, 1 grandan draŝmaŝinon, 2 rikoltmaŝinojn, 10 semadmaŝinojn, 15 maŝinplugilojn kaj maŝin-erpilojn kaj krome 1 motoran vel-ŝipon kaj 6 traktortiratajn trenĉarojn. Kiam oni paŝas en tiun ĉi komunumon, oni tuj rimarkas vere imponan “bildon de mekanika kulturado.” Apenaŭ la surfaco de Jangzi-rivero ruĝiĝis pro la brilanta matenruĝo, kiam ektondras la motorbruo sur la ebenaĵo de sennombraj kampoj en la reto de fluejoj kaj kanaloj. Ĉe la dudekelkajstacioj de mekanika irigaciado, la pumpiloj eljetas blankajn akvokolonojn similajn al arĝentaj drakoj, sendante la subjungitan river-akvon en la kampojn. Trenante post si brilantajn plugilojn kvin-sokajn aŭ naŭsokajn, la traktoroj renversas supren grandajn pecojn da fekunda tero. Sur la draŝejo la draŝmaŝino estas forglutanta la monteton de grenrikoltajoj laŭ la rapideco de 2,500 ĝinoj da grenoj disigitaj ĉiuhore.

Fortaj ĉevaloj kun novaj seloj

Ke la popola komunumo povis en mallonga tempo plenumi la taskojn, kiujn la altgradaj kooperativoj ne sukcesis dum kelkaj jaroj, estas antaŭ ĉio pro tio, ke la popola komunumo pligrandigis la kolektivan akumulon kiu provizis por la agrikultura mekanikigo grandan kvanton da kapitalo, kiun la altgradaj kooperativoj ne povis.

Ekde la aŭtuno de 1956 ĝis la somero de 1958, la dek ses altgradaj kooperativoj entute akumulis 384,000 juanojn. Meznombro ĉiu kooperativo akumulis 12,000 juanojn poĵare. La sumo de pli ol dekmil juanoj ne estis malgranda, sed por aĉeti grandan agrikulturan maŝinon, ĝi ne estis sufiĉa. Ekde 1955 la anoj de la Tiangie-a Kooperativo jam volis aĉeti pumpmaŝinon, sed mankis al ili mono. La Ĝardena Kooperativo aĉetis motoron, sed ĝi ne havis plu monon por aĉeti pumpilon. “Aĉetinte ĉevalon, oni jam ne plu havas monon por aĉeti selon.” Kion fari? Nur post kiam la rizo estis rikoltita, oni povis uzi la maŝinon por prilabori la grenon, sed dum la ceteraj tagoj ĝi ne povis esti plene utiligata. Nur la Ĉanggiang-a Kooperativo estis kompare pli bonstata.

Ĝi estis pli granda, sekve ĝia akumulita fonduso ankaŭ pli multa. Krom la ses traktoroj, kiujn la ŝtato disponigis al ĝi, la kooperativo mem aĉetis 1 draŝmaŝinon, 2 rikolt-maŝinojn kaj 1 pumpmaŝinon. El la restantaj 15 kooperativoj, nur 11 aĉetis entute 9 pumpmaŝinojn.

Post la fondiĝo de la popola komunumo, kiam la organizo pligrandiĝis kaj la aktiveco de la amaso plene mobiliziĝis, la produktado tuj surrajdis milmejl-an ĉevalon. Dum unu jaro la totala enspezo de la komunumo pliiĝis je 24.4% kompare kun tiu de la pasinta jaro kaj la kapitalo akumulita atingis 637,622 juanojn. Kun tia fortika materia bazo, la agrikultura mekanikigo ekflugis kun etenditajflugiloj. La produktaj brigadoj kun maŝinoj estis ankoraŭ pli bone ekipitaj kaj tiuj sen maŝinoj fariĝis maŝin-disponantaj. La kvar brigadoj, kiuj vane esperadis havigi al si "feran drakon" dum pluraj jaroj, portis hejmen kun eksterordinara ĝojo sep pumpmaŝinojn. La Tiangie-a Brigado, kiu akumulis pli ol 350,000 juanojn en unu jaro, aĉetis pumpmaŝinon per 9,000 juanoj kaj estas nun preta aĉeti ankoraŭ unu per 6,000 juanoj. La tero de la Liuĝuang-a Brigado estis alta. Kiam okazis sekegeco antaŭ la Liberiĝo, oni devis pagi 50 cendojn por aĉeti akvon por irigacii unu muon da tero. En la periodo de la altgradaj kooperativoj, la akvoutiligaj kondiĉoj multe boniĝis, sed oni ankoraŭ devis vicigi akvoĉerpilojn en tri ŝtupoj por la akvumado. En 1959, la pli ol 200 muoj da rizkampoj de la brigado estis tute irigaciataj per maŝinoj.

El la publika akumulajo, kiun la popola komunumo prenis el tiu de la produktaj brigadoj, kaj la profito akirita de la komunum-administrataj entreprenoj, la popolkomunumo elspezis 149,500 juanojn por aĉeti 6 traktorojn, 2 pumpmaŝinojn, 1 motoran velŝipon, 4 traktortiratajn ĉarojn kaj parton de aliaj grandaj maŝinoj por terkulturado. La mekanika forto estis pligrandigita ĉiuflanke, ĉu en plugado, drenado, irigaciado, ĉu en transportado kaj prilaborado de agrikulturaj produktaĵoj. La komunumanoj forte sentis, ke la popolkomunumigo estas la ĉefa

garantio por akceli la efektivigon de agrikultura mekanikigo.

La kontraŭdiroj forigitaj, la "feraj drakoj" pli potencaj

La popola komunumo venkis limitecon de malgranda kolektivo, kiun la altgrada kooperativo havis, kaj pligrandigis sian sferon de agado, tiel ke la lalenta forto de la agrikulturaj maŝinoj povis esti plene utiligita. La efiko de utiligo de ĉiu pumpmaŝino hodiaŭ estas egala al tiu de kvin aŭ ses pumpmaŝinoj en la pasinteco. Unu traktoro plenumis en unu jaro tiom da laboro, kiom ĝi devus plenumi en tri aŭ kvin jaroj antaŭe.

Estis tre strange, ke dum la periodo de altgradaj kooperativoj, unuflanke oni havis malmulte da maŝinoj kaj ne povis aĉeti pli, sed aliflanke pluraj el la disponeblaj maŝinoj "kaptas fiŝojn dum tri tagoj, sed sekigas retojn dum la sekvantaj du." Dum la trijara ekzistado de altgradaj kooperativoj, ĉiu pumpmaŝino funkciis meznombro nur 40 tagojn ĉiujare. Pro kio?

Unu el la kialoj estis ke la kontraŭdiroj en la akvoutiligo inter la altgradaj kooperativoj ne povis esti kontentige solvitaj, la irigacia sistemo ne povis esti unuece aranĝita, la fluejoj ne povis esti grandnombre elfositaj, la akvo ne povis libere fluadi, kaj sekve la pumpmaŝinoj ne povis esti plene utiligataj. La kontraŭdiroj konkrete prezentiĝis en la problemo de intermiksa lokiĝo de kampoj inter la kooperativoj. Ekzemple: la Bajĝa-a kaj Sunĝuang-a Altgradaj Ko-

Kiam venas printempo kaj pompas la floroj

Papertranĉaĵo de Ci Hju



operativoj, kiuj nun unuiĝis en la Bingiang-an Produktan Brigadon, tiam havis 4-500 muojn da kampoj intermikse situantaj. La du kooperativoj posedis po du pumpmaŝinoj kaj ambaŭ devis fosi fluejojn. Sed kiu fosu? Se Sunĝuang-a Kooperativo ekfosus, la fosado tuj tuŝus la kampojn de la Bajĝa-a Kooperativo. La anoj de la Bajĝa-a Kooperativo diris: "Ĉu vi supozas, ke ni permesas vin fosi fluejon en niaj kampoj por irigacii la viajn." La Sunĝuang-a Kooperativo proponis interŝanĝon de la kampoj, sed leviĝis nova problemo: ilia grundo estis malpli fekunda ol tiu de la tero de la Bajĝa-a Kooperativo. Ĉu oni ne malprofitos en la interŝanĝo de la bona por la malbona? Neeble! Do, dum tri jaroj ambaŭ kooperativoj nur fosis en siaj propraj kampoj dislokitaĵn malgrandajn fluejojn kun longeco de 1,500 metroj entute. La fluo ne sufiĉis eĉ por satigi unu pumpmaŝinon, do tri el la kvar pumpmaŝinoj povis nur suspiri pro sia senlaboreco.

Krom la kontraŭdiro de la intermiksa lokiĝo de la kampoj, sin trovis kontraŭdiro ankaŭ inter la altaj kaj malaltaj kampoj. Oni kreskigis sekkampajn grenojn en la altaj kampoj kaj rizon en la malaltaj. Kiam la vetero estis tro seka, la akvo, kiun la kooperativo de malaltaj kampoj enkondukis, preterpasante la altajn kampojn de alia kooperativo facile superfluis la mallarĝajn, malprofundajn fluejojn kaj malhelpis la normalan kreskadon de la sekkampaj grenoj en la altaj kampoj. Okaze de inundo, la kooperativo de malaltaj kampoj devis defluigi la akvon, kiu preterpasante la altajn kampojn, facile inundis la sekkampajn grenojn. Tial kiam unu volis enkonduki akvon, la alia tion ne permesis, kaj kiam unu volis defluigi akvon, la alia ne konsentis. Nek akvo-enkonduko nek akvodefluigo povis laŭbezzone efektiviĝi, sekve maŝinoj ankaŭ ne povis esti utiligataj. En 1957 kiam okazis pluvino, sukcesis funkcii neniu el la tri pumpmaŝinoj, kiujn instalis la kooperativoj de Tiangie, Tajping kaj aliaj sur la malaltaj kampoj, ĉar ne konsentis la Ĉangĝiang-a Kooperativo, kies kampojn la defluigenda akvo devis preterpasi kaj kiu timis esti inundita.

La popola komunumo kunligis la dek ses grandajn kaj malgrandajn, alte situantajn kaj malalte situantajn altgradajn agrikulturajn kooperativojn en unu unuigitan grandan kolektivon. Ĉiuj tiaj komplikitaj kontraŭdiroj estis definitive forigitaj unu fojon por ĉiam. La kooperativoj kun similaj naturaj kondiĉoj estis unuigitaj en unu produktan brigadon kaj la tero estis unuece utiligata. Do nature malaperis la kontraŭdiro de la intermiksa lokiĝo de kampoj. Kaj la komunumo helpis la brigadojn, kiuj fondiĝis surbaze de antaŭaj altgradaj kooperativoj, interŝanĝi la kampojn laŭ la principo de egalvaloreco, kaj solvis la problemon de intermiksa lokiĝo de kampoj, kaj ebligis la grandkvantan fosadon de fluejoj. De post kiam la Bajĝa-a kaj Sunĝuang-a Kooperativoj estis unuigi-

taj en Bingiang-an Produktan Brigadon, oni grandskale konstruis aŭ rekonstruis fluejojn laŭ unueca plano per pli ol 300 plenfortaj laboruloj. De la vintro de 1958 ĝis la printempo de 1959, ili finkonstruis 3,000 metrojn da trunkaj fluejoj, 5,072 metrojn da ĉefaj fluejoj kaj pli ol 5,200 metrojn da branĉaj fluejoj. La suma longeco superis pli ol okoble tiun de ĉiuj fluejoj fositaj dum la antaŭaj tri jaroj kaj nun ĉiuj kvar pumpmaŝinoj povas plene funkcii.


Samtempe kun la grandskala fosado de irigaciaj fluejoj, la popola komunumo, laŭ unueca plano de akvo-utiligo, mobilizis de la vintro de 1958 ĝis la printempo de 1959 pli ol 4,000 anojn por dragi aŭ konstrui sep riverojn kaj konstrui aŭ rekonstrui sep kluzojn, por ke la novaj kaj malnovaj fluejoj kaj riveroj inter la altaj kaj malaltaj kampoj kunligiĝu kaj formiĝu en unu unuigitan akvosistemon. Kiam la historia kontraŭdiro de akvo-utiligo estis radikale forigita, ĉiuj pumpmaŝinoj en la altaj kaj malaltaj kampoj plene elmontris sian potencon.

Post la forigo de kontraŭdiroj kaj unuigo de akvo-sistemo, la komunumo starigis, laŭ la akvo-deveno, la alteco de la tero kaj la bezonoj de en- aŭ defluigoj, 28 staciojn de mekanikaj drenado kaj irigacio. Antaŭe pro la malgrandeco de la fluejoj, la plejparto de la pumpmaŝinoj nur drenis sed neniom

Revenvoje de sterkokolektado

Lignogravuraĵo de Loŭ Ĝaŭ-ĵan





Flordesegna Montdeklivo *Lignogravuraĵo de Niu Ven*

aŭ nur malmulte irigaciis. Nuntempe ili aŭ irigacias aŭ drenas tage kaj nokte laŭ la aktualaj bezonoj kaj la latentaj fortoj de la maŝinoj estas plene utiligata. Kompare kun tiu dum la periodo de la altgradaj kooperativoj, la tutjara irigaciita areo de ĉiu pumpmaŝino pligrandiĝis de 1,394 muoj ĝis 1964 muoj kaj la meznombra tempo de sintezaj utiligoj pli multiĝis de 40 tagoj ĝis 288. La irigaciita areo de rizkampoj de la tuta komunumo en 1959 pligrandiĝis de 1.400 muoj ĝis 49,000 muoj. Krome, 39,400 muoj estis drenitaj.

La maŝinoj fariĝis multpovaj

Dum la periodo de la altgradaj kooperativoj, alia kialo, kiu malhelpis plenan utiligon de la mekanikaj ekipaĵoj, estis tio ke la tiamaj agrikulturaj maŝinoj koncentriĝis ĉefe en la Ĉanggiang-a Agrikultura Kooperativo. La sfero de agadoj de unu kooperativo estis pli malpli limigita, sekve sinteza utiligo de tiuj maŝinoj fariĝis nebla. Ekzemple, la ŝtato disponigis al tiu ĉi kooperativo 6 traktorojn. Ĉar ĝi plantis nur sekkampajn grenojn, la planta kaj rikolta tempoj estis kompare koncentritaj kaj la terkulturado per traktoroj devis sin limigi en 20-30 tagoj. Kion fari dum la ceteraj tagoj? Kiam inundo estis defluigata, triono el la 19 pumpmaŝinoj de la kooperativo ne povis esti uzata por la defluigado, des malpli povis la traktoroj partopreni en la akvo-defluiga laboro. Kvankam la traktoroj partoprenis en la transportado de post 1957, tamen la tutjara transporta kvanto estis

nur 34 tunoj. Ĉiu traktoro funkciis meznombro nur proksimume 70 tagojn ĉiujare. Sed la aliaj kooperativoj kiel Bingiang, Gardeno kaj aliaj havantaj pli ol 13,000 muojn da kampoj por sekkampaj grenoj vane sopiradis la terkulturadon per traktoroj.

Post kiam fondiĝis la popola komunumo, tia situacio rapide ŝanĝiĝis. La komunumo starigis traktoran stacion kaj transprenis la ses traktorojn de la Ĉanggiang-a Brigado kaj metis ilin sub unuecan direktadon, por ke ili estu utiligataj pli racie en pli granda sfero. Laŭ la diferenco de la planttempo de diversaj rikoltaĵoj kreskigataj de la brigadoj, la traktora stacio antaŭfiksas laborplanon. Erpinte la kampojn por fruaj plantaĵoj, la traktoroj erpas tiujn por malfruaj kaj pluginte la kampojn por sekkampaj grenoj, ili plugas tiujn por rizo. Kiam la tasko en terkulturado estas tute finita, ili ĉerpas akvon por pli malaltaj kampoj. Nun la funkciaj tagoj de ĉiu traktoro dum unu jaro plialtiĝis de la antaŭaj 70 tagoj ĝis 300 tagoj kaj la laborkvanto de ĉiu norma traktoro plialtiĝis de la antaŭaj 33,720 muoj ĝis 46,965 muoj. "La komunumo eĉ ŝanĝis la karakteron de la maŝinoj!" diris la kamparanoj. "Tiuj 'feraj bovoj' nun fariĝas 'aktivuloj'!"

Kiam la sfero de agadoj estas pligrandigita, ankaŭ la pumpmaŝinoj estas sinteze utiligataj. Krom irigaciado kaj drenado, la 55 pumpmaŝinoj de la komunumo plenumas ankaŭ la taskojn de grenprilaborado, elektroproduktado kaj draŝado dum sia senokupa tempo. La kvanto de greno prilaborita por la komunumanoj sole atingis 9,400,000 kg. en la pasinta jaro.

Por la maŝinoj troviĝis riparejo kaj manipulantoj

La mankoj de teknikaj laborantoj kaj de faciligoj por maŝinriparado estis ankaŭ du malfacile solveblaj problemoj por la altgradaj kooperativoj en sia disvolvado de agrikultura mekanikigo. Post la fondiĝo de la popola komunumo, ankaŭ tiuj malfacilaĵoj estis tuj venkitaj.

En la periodo de altgradaj kooperativoj nur la Ĉanggiang-a Kooperativo sola havis unu tornilon kaj unu bormaŝinon, kiuj povis ripari maŝinpecojn. La aliaj kooperativoj devis veturi al Nankino, Ĉangĝou aŭ Vuhi eĉ por laŭfarigi ŝraŭbon. Pro la nesufiĉeco de ekipaĵoj kaj ne kompleteco de laborspecoj, eĉ la Ĉanggiang-a Kooperativo estis ne kompetenta pri la laboroj de rabotado, veldado aŭ muldado. De post sia fondiĝo en la komenco de 1959, la popola komunumo starigis maŝinriparejon, kiu krom lupreni la du maŝinojn de la Ĉanggiang-a Brigado pagis pli ol 13,000 juanojn por aĉeti 4 tornilojn, 1 cilindro-bormaŝinon kaj 1 elektromotron, kaj aldonis la jenajn laborspecojn: elektroveldado, oksigen-veldado kaj muldado. Nuntempe, kiu ajn ordinara maŝinpeco povas esti riparita en la daŭro de unu manĝo kaj la pli

grandaj en tri aŭ kvin tagoj. Ĉar la ekipaĵoj estas senĉese plimultigataj kaj la tekniko senĉese plialtigata, la specoj de riparlaboroj ankaŭ plimultiĝas de 300 ĝis 800. La plejparto de riparlaboroj de la komunumo povas esti plenumita en la propra riparejo.

Kune kun la solvo de la problemo de maŝinriparado, rapide pligrandiĝis ankaŭ la teknika personaro. La komunumo malfermis sinsekve tri trejnajn kursojn de tekniko, el kiuj bakiĝis pli ol 180 mekanikolaborantoj. En la maŝinriparejo eltrejniĝis aro da tornistoj, stablo-laboristoj, elektristoj kaj veldistoj per metilernanto-edukado. En la pasinteco, la Ĉanggiang-a Kooperativo kulturis pli ol 90 teknikistojn, sed pro la limigita agadsfero de la maŝinoj efektive nur sesdek kelkaj personoj estis bezonataj por manipuli la maŝinojn. Sed la aliaj 12 kooperativoj kun maŝinoj ne trovis kompetentajn teknikistojn. Hodiaŭ krom la teknikistoj nove trejnitaj de la komunumo, la brigadoj ankaŭ praktikis inter si teknikan kunlaboradon, en kiu la Ĉanggiang-a Brigado transdonis pli ol 30 teknikistojn por subteni tiujn brigadojn, al kiuj mankis teknikistoj. Kalkulante la novulojn kaj la malnovulojn, la tuta komunumo nun havas 244 teknikistojn. El la 16 brigadoj ĉiu havas meznombro 10-15 teknikistojn.

“Du solvoj” kaj “unu akcelo”

La rezultato de la rapida disvolvo de agrikultura mekanikigo dum la pasinta jaro fundamente solvis la du historie nesolvitajn problemojn de ofta inundado kaj trosekeco kaj streĉiteco en laborforto, kio ege

Teo-rikoltantaj Junulinoj

Lignogravuraĵo de Gaŭ Zong-zaŭ



akcelis la pliprodukton de agrikulturo kaj ĝiaj flankokupoj. La rimarkinda plifortigo de mekanika irigacio kaj la grandskala konstruado de akvo-utiligo ĝisfunde renversis la “akvujegon”. Malgraŭ ke en la somero kaj aŭtuno de 1959, oni spertis ĉi tie sinsekve la inundon tiel severan kiel tiu en 1956 kaj la trosekecon senprecedencan en la lasta jarcento, la aŭtuna rikolto estis ankoraŭ abunda. Sed pro la inundego de 1956, 8,000 muoj estis absolute senrikoltaj kaj la rikolto en 29,000 muoj malpliĝis je 40%. En la somero de 1958, la rizrikolto malpliĝis pli ol 20% pro senpluveco dum 20 tagoj. Kaj rezulte de la pligrandigo de mekanika plugado kaj mekanika irigacio, ŝpariĝis en 1959, entute pli ol 947,500 labortagoj, kiujn oni transigis al la kampa administrado, sterko-amasigo kaj disvolvo de flankokupoj. En 1959 oni sarkis tri aŭ kvar fojojn anstataŭ la antaŭaj unu aŭ du fojoj kaj la laborforto dediĉita al la kampa administrado pliiĝis de la antaŭaj kvin labortagoj po muo ĝis dek unu. En la somera rikolto kaj semado de 1957 la laboro de disgrajnigo ne povis esti ĝustatempe plenumita pro manko de laborforto, sekve pli ol 800,000 kg. da greno de la dek ses kooperativoj ŝimdefktiĝis kaj la semado malfruiĝis je dekelkaj tagoj. Sed en 1959, ne nur la tuta laboro de somera rikolto kaj disgrajnigo kaj la somera semado plifruigiĝis je dekelkaj tagoj ol en 1958, oni ankaŭ disponigis 4,000 personojn al sterko-amasigo, kio pliiĝis la kvanton de kresko-akcela sterko al pli ol 12,000 muoj da malfrua rizo je 80% pli multe ol en la pasinta jaro, kaj krome 700 personojn al la produkto en flankokupoj. Ĉio ĉi tio rekte akcelis la pli grandan antaŭensaltegon de la produktado en agrikulturo kaj flankokupoj.

La komunumanoj, kiuj persone spertis la superecon de la popola komunumo kaj gustumis la bonojn de la agrikultura mekanikigo, estas plenaj je pli granda memfido kaj forto por plue plibonigi la popolan komunumon kaj efektiviĝi la agrikulturan mekanikigon. Ili jam skizis la unuapaŝan planon por la disvolviĝo en la sekvontaj tri jaroj. La tutjara enspezo de 1962 pliiĝos je 123.7% ol en 1959. Sur tiu ĉi bazo pliiĝos 20 traktoroj kaj 20 grandaj draŝmaŝinoj, por ke la laboroj de plugado ĝis disgrajnegado de 32,000 muoj da sekaj kampoj estu tute mekanike plenumitaj. En la regiono de rizkampoj, krom la disvolviĝo de mekanikigo, ili starigos 18 elektrajn irigaciajn staciojn, por ke la 45,000 muoj da rizkampoj estu irigaciataj per elektro kaj abunda rikolto estu garantiata spite de trosekeco aŭ inundo. Samtempe ankaŭ la mekanika transportado estas disvolvita, por ke la mekanika transporta kvanto pliiĝu de la nunaj 16,000 tunoj ĝis 50,000 tunoj. Ili firme kredas, ke sub la prudenta gvidado de la Partio kaj dank' al la supereca sistemo de la popola komunumo, tiu ĉi plano nepre efektiviĝos en pli mallonga tempo.

**Kolektive verkis Doŭ Tian-ju,
Giang Hian-gui, Giang Vej-caj,
Ĵen Ĵong-hua kaj Ŝi Ĝaŭ-hiang.**

Grandioza Projekto Efektivigata

— Pivota Akvoutiliga Konstruo de la Tri Kanjonoj de Jangzi-rivero —

BELA plano de la pivota akvoutiliga konstruo de la Tri Kanjonoj de Jangzi-rivero estas jam finfarita de Projekta Kontoro por la Baseno de Jangzi-rivero. Laŭ tiu plano estos konstruata granda barajo, kiu baros kaj konservos fluegon, por produkti elektron, irigacii kampojn, likvidi inundojn kaj radikale forigi navigaciajn danĝerojn en Jangzi-rivero. La konstruado jam komenciĝis en somero de la jaro 1956 sub la helpo de eminentaj specialistoj senditaj de la Sovetia Registaro.

La ĉefa konstruo de la akvoutiliga pivoto de la Tri Kanjonoj estos starigo de barajo tranĉanta transverse Jangzi-riveron ĉe Hiling-kanjono en Jiĉang de Hubej-provinco. La barajo altos pli ol 200 metrojn, t. e. kvazaŭ domego kun 60 etaĝoj, kaj longos proksimume 7.5 liojn. Ĝia elfluigejo havos 15 kluzpordojn, kaj la altprema pordo, kiu reguligas la kluzpordojn pezas je pli ol 1,000 tunoj. Post finkonstruo de la granda digo, ĉe la Tri Kanjonoj, kie nun krute staras altaj montoj, formiĝos artefarita lago kun longeco de 775 kilometroj, surfaco de 1,440 kvadrataj kilometroj kaj kapacito por enteni 100,000,000,000 kubmetrojn da akvo. En ordinara tempo la granda akvokonservejo tenos akvonivelon de proksimume 200 metroj, kaj ĝi povos redukti la eksterordinare grandan fluegon de 100,000 sekund-kubmetroj ĝis 4,000 sekund-kubmetroj, kiam la fluego atingos la akvokonservejon. Tiam, la katastrofoj de inundo, super-


malsekeco, digrompo kaj trosekeco ĉe la bordoj de Jangzi-rivero estos radikale forigitaj.

Post konstruiĝo de la granda akvokonservejo la akvo de Jangzi-

rivero povos esti kondukata norden por provizi la Flavan Riveron. Post la kuniĝo de Jangzi-rivero kun la Flava Rivero la sekkampoj de la vasta ebenaĵo de

Parto de la Tri Kanjonoj de Jangzi-rivero

Foto de Hjue Zi-giang



norda Ĉinio kaj la regiono de Huaj-rivero estos ŝanĝitaj en irigaciatajn kampojn. Tiam akvo de la Flava Rivero povos esti kondukata nordokcidenten por irigacii la sekan Gobion. Dank' al konduko de la akvo de sudaj riveroj al la nordaj kaj dank' al fosiĝo kaj konstruiĝo de kanaloj Sud-norda, Jangzi-Huaj-a kaj Hubej-Henan-a, kaj de la akvo-kondukejoj de Han-rivero kaj Huaj-rivero al la Flava Rivero en la tuta lando formiĝos araneaje

Esplor-borado ĉe la Tri Kanjonoj

Lignogravuraĵo de Huang Jan



densa navigacia reto. Tiam iros man-en-mane Jangzi-rivero, la Flava Rivero, Ĝu-rivero, Huaj-rivero kaj Haj-rivero, kaj kunligiĝos Bo-maro, la Flava Maro, la Orienta Maro kaj la Suda Maro, kaj per ŝipo oni povos veturi de Kantono laŭ la Sudnorda Kanalo trans Jangzi-rivero rekte al Pekino.

Tiam navigaciaj danĝeroj en la Tri Kanjonoj fariĝos pasintajo kaj grandaj ŝipoj 10,000-tonelaj povos navigacii de Vusong de Ŝanhajo rekte al Jibin de Siĉuan-provinco. Pli supren, tra Ginŝa-rivero kaj Tongtian-rivero 500-tonelaj ŝipoj povos atingi Muluusu-riveron — la fonto de Jangzi-rivero — kaj ankri ĉe la piedo de neĝkovrataj montpintoj de Tanglha-montaro. Tiam la trunko de Jangzi-rivero povos funkcii kiel transporta linio egale al 200 fervojoj. Kalkulate sur bazo de 300 ŝip-karavanoj ekspeditaj po tagnokto, jara kvanto de frajto atingos 2,100 milionojn da tunoj.

La instala kapacito de la hidroelektra stacio de la Tri Kanjonoj estos 22 milionoj da kilovatoj, kaj da elektro ĝi produktos jare 127 miliardojn da kilovat-horoj, t. e. 6.6-oblo de la tutlanda elektro-produkto dum la jaro 1957. Se ni kalkulas laŭ laborkvanto, tiom da elektroenergio egalas al la tuta laborforto de la lando kaj sufiĉos por produkti da ŝtalo 150 milionojn da tunoj aŭ da aluminio pli ol ses milionoj da tunoj. Kaj la kosto de produktita elektro estos tre malkara: por unu kilovato-horo nur 0.002 juano, tamen la enspezoj de elektrolivero sola jam redonos la tutan investon de la pivota akvoutiliga konstruo de la Tri Kanjonoj en du kaj duono da jaroj. En la hidroelektra stacio instalota turbin-generatoro estos inter la plej grandaj en la mondo kaj la grandeco de unuopa maŝinego egalos al aŭditorio por kelkmil personoj. La produktata elektra kurento povos esti kondukata

norden trans la Flava Rivero ĝis Pekino, suden trans Kiongĝoŭ-markolo ĝis Hajnan-insulo, okcidenten ĝis Ĉengdu kaj orienten ĝis Ŝanhajo. Tiam la elektrosistemoj de la regionoj de la Flava Rivero, Hin-an-rivero, Ĝu-rivero, Hejlong-rivero kune kun tiu de la Tri Kanjonoj formos grandan elektran reton tra la tuta lando.

Jangzi-rivero, longa je 5,800 kilometroj estas unu el la kvar plej grandaj riveroj de Ĉinio. Laŭ takso, ĉiujare ĝi enverŝas en la maron bilionon da kubmetroj da akvo. Hidraŭlika kapacito de la akvosistemo de Jangzi-rivero okupas pli ol 40 procentojn de tiu de la tuta lando. Kruta estas la riverlito kaj rapida estas la fluo. La niveldiferenco atingas pli ol 5000 metrojn, kaj la en-tenata hidraŭlika kapacito atingas 230 milionojn da kilovatoj. Sed tiel abunda hidraŭlika fonto ne estis efike utiligata dum la pasinta tempo sed malfeliĉigis per inundoj, jaro post jaro, la loĝantojn ĉe ambaŭ bordoj de la rivero. Laŭ statistiko, en pli ol 2,000 jaroj de 185 a.K. ĝis la jaro 1911 p.K. okazis 214 superakvegoj, t. e. meznombro unufoje en 10 jaroj. En lastaj 40 jaroj superakvegoj estis ankoraŭ pli oftaj, ke ĝi okazis ĉirkaŭ po 5 jaroj. La superakvego okazinta en la jaro 1931 inundis pli ol 50,000,000 muojn da agroj kaj dronigis pli ol 140,000 personojn. Ĉiujaraj elspezoj por ordigo de agroj kaj riparado de digoj, kaj perdoj de detruitaj domoj kaj agroj, kaŭzitaĵ de inundoj estis des pli ne kalkuleblaj.

Dum la regado de Kuomintanĝa reakcia registaro iam oni ankaŭ pensis pri entrepreno de akvoutiligo ĉe la Tri Kanjonoj kaj eĉ stariĝis organizoj: Komitato de Hidroelektra Projekto ĉe la Tri Kanjonoj kaj Esplora Oficejo pri la Tri Kanjonoj de Jangzi-rivero. Ankaŭ Usona inĝeniero Savage iam venis al la kanjonoj kun grupo da tiel nomataj inĝe-

nieroj kaj ekspertoj, sed la fina komunikado estis: "Pro financaj limigoj la laboroj super hidroelektra projekto ĉe la Tri Kanjonoj

estas provizore ĉesigitaj". La rezulto de laboroj dum tri jaroj estas nur du bortruoj en Nankinguan.

Zigzaga Vojo en Kinling-montaro

Lignogravuraĵo de Feng Gong-tie



Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj

Traduko aŭ aliaj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur:

1) Sendu al ni 2 ekzemplerojn de la materialoj sur kiuj aperis la tradukoj aŭ alimaniere utiligoj kun indiko de deveno.


2) Sciigu al ni kia estas la eldonaĵo sur kiu aperis via traduko aŭ aliaj utiligoj, se eble ankaŭ nombron de la legantoj.

Per tiaj kunlaboroj, vi multe akcelos la progresadon de nia movado en Ĉinio, sekve ankaŭ alportos plian brikon por la sukceso de Esperanto-movado en la tuta mondo.

Gehidroteknikistoj, atentu!

En la hidraŭlika laboratorio de la Hungarlanda Scienca Esplorinstituto de Akvomastumado, Budapeŝto, komenciĝis E-kurso lastjare, kies anoj estas geinĝenieroj, geteknikistoj kaj aliaj gelaborantoj de la laboratorio, kie krome ankaŭ laboras 3 malnovaj esp-istoj. Ili ĉiuj tre deziras korespondi kun kolegoj de aliaj landoj, por eventualaj reciprokaj personaj vizitoj pli poste, kun celo de spert-interŝanĝo. Ili ankaŭ celas pliriĉigon de sia faka vortarmaterialo pri hidraŭlika kaj akvomastumado. Amika kunlaborado estas petata.

Oni sendu leterojn pri fakaj aŭ ĝeneralaj temoj, pere de la kursgvidanto: Ujlaky-Nagy Tibor, Vituki Laboratorium, eszperantó kör. Budapest IX., Kvassay zs:lip. Hungariando.



K

IAM la ĉina popolo ĝojplene celebris la dekjaran jubileon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, lastjare impone ekstarigis majesta konstruaĵo ĉe Tian-anmen-placo. Ĝi estas la Popola Halo, kunveno de la reprezentantoj de la 600-miliona popolo por diskuti pri la politiko de la lando kaj sidejo de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso por interkonsiliĝi pri ŝtataj aferoj. Tian-anmen fariĝas pli sopirata loko de nia popolo.

La Popola Halo, la plej grandicza konstruaĵo nun en Pekino, situas ĉe la dekstra flanko antaŭ Tian-anmen, kun totala planka areo de 171,800 kv. metroj kaj volumeno de 1,596,900 kubmetroj. Ĝia totala planka areo superas la efektivan plankan areon de la


malnova Imperiestra Palaco. Kaj ĉinaj laboristoj sukcesis finkonstrui ĝin en iom pli ol dek monatoj, kalkulate ekde la projektado.

Akompanate de la arkitektoj, ni iris de Tian-anmen-placo al la fronto de la granda Halo. La nacia emblemo sur la frunto de la fronta portalo brilis ore jam de malproksime. Surpasinte la grandan ŝtuparon granitan, ni trovis nin fronte al dekdu helgrizaj kolonegoj el marmoro, altaj je 25 metroj, ĉirkaŭbrakumebla nur de kvar homoj. La kolonoj estas interspacigitaj laŭ la tradicia aranĝo de ĉina arkitekturo, larĝe ĉe la meza interspaco kaj laŭgrade malpli larĝe ĉe la flankaj, sinsekve ĝis la ekstremoj. Tiu aranĝo estas malsama ol la klasika okcidenta konstruarto kaj ankaŭ ne tute imitas la tradician ĉinan. La arkitektoj kombinis la bonajn

punktojn de kolonaj strukturoj el arkitekturo ĉina kaj eksterlanda, antikva kaj moderna, por krei ĉi tian altan kaj fortan kolonejon.

Trapasinte grandan orflavan laŭtunan pordegon kaj transirinte la tre vastan vestiblan salonon kaj vestodeponejan salonon, ni trovas nin en la centra salono, la pivota parto de la giganta konstruaĵo. La arkitektoj konigis nin pri la ĝenerala plano de la tuta halo: okcidente estas la granda aŭditorio kun dekmil sidlokoj; norde loĝas la banked-salono; kaj sude longa koridoro kondukas al la oficeja domego de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso. La tuto konsistas el tiuj ĉi tri partoj, ĉiuj kun sia propra karakterizaĵo, kaj samtempe kombinitaj en harmonia tuto.

Trans la centra salono ni venis al la granda aŭditorio por dekmil



La granda aŭditorio de la Popola Halo


Foto de Zoŭ Gian-dong k Niu Vej-ju

floraj petaloj. Cirkaŭe estas tri ondantaj cirkloj unu ekster alia kun kaŝitaj kavajoj por lumigiloj. Harmonie kun la bluaĵo de la ĉir-

kaŭe tegitaj plastikaj tabuloj, formas mirindan vidaĵon de “kunfandiĝo de la ĉielo kaj akvo” kaj “unuiĝo de la ĉielo kaj la tero.”

Parto de la granda aŭditorio

Foto de Ĉu Jing




personoj—la kunveno de la Tutlanda Popola Kongreso. Ekstere ĝi aspektas kvazaŭ alta domo kun dekelkaj etaĝoj. Por priskribi per ciferoj: interne ĝi larĝas 76 metrojn, profundas 60 metrojn kaj altas en la meza parto 33 metrojn, kun volumeno de 86,000 kubmetroj. Tamen, dank’ al la genia aranĝo de la arkitektoj, la vasteco ne donas senton de malpleneco, kaj oni vidas en la aŭditorio nur harmonian tuton kun kurbaj linioj supre kaj malsupre, kiam oni vagas okule de la plafono ĝis la planko. La plafono estas kupolforma, kun preskaŭ 500 lampotruoj dense lokitaj. Kiam la lampoj lumiĝas, ĝi aspektas kvazaŭ stelplena ĉielo. De la centro de la kupolo pendas ruben-simila lumigilo en formo de kvinpinta stelo de kiu disetendiĝas 70 ore brilantaj radioj kaj 40 orumitaj sun-

La estrado aspektas kvazaŭ eta kunvenejo kun sidlokoj por pli ol 300 homoj. La ovala aŭditorio konsistas el tri etaĝoj, inkluzive la surteran. Sur la teretaĝo sintrovas pli ol 3,600 sidlokoj, ĉefe por reprezentantoj, kiuj estas ekipitaj per po unu aŭskultilo de instalaĵo por samtempa interpretado en dek du lingvoj, kaj ankaŭ per mikrofono ĉe ĉiu kvara por laŭtparoli ĉe la sidloko. Sur la unua- kaj dua-etaĝaj balkonoj, sintrovas pli ol 3,400 kaj pli ol 2,600 sidlokoj, respektive. La unua vico de sidlokoj sur la unuaetaĝa balkono estas same ekipita kiel tiuj sur la teretaĝo, kaj ĉiuj ceteraj sidlokoj estas ekipitaj per po unu megafono por aŭskulti unu lingvon. La lamplumo el la plafono kaj el tiu sub la balkonoj lumigas ĉiujn angulojn de la aŭditorio. La du balkonoj simile al du novlunoj ĉirkaŭrigardas al la estrado, ke formiĝas tuto kun klara perspektivo kaj interesa varieco.

La aŭditorio estas tiel perfekta en formo, tiel freŝa en koloro, ke ni ne povas ne laŭdi la elstaran kreemon kaj sagon de la konstruistoj. Tamen, kiel oni solvis la problemon de akustiko en tiu ĉi granda spaco, por ke en ĉiuj anguloj oni povu klare aŭdi parolojn el la estrado?

La marmora ŝtuparo kondukanta al la banked-salono

Foto de Giang Ki-seng




Ilumina dekoracio sur la plafono de la banked-salono *Foto de Ĉu Jing*

Kiam la konstruado preskaŭ finiĝis, la konstrulaboristoj okazigis kunvenon ĉi tie por soleni la kompletigon de la giganta konstruaĵo. Ni ankaŭ partoprenis la feston dum kiu la fama aktoro, Mej Lan-fang, ludis Pekinan operon "Ebriiĝo de Jang Guj-fej". Ni iris de la unua vico de sidlokoj ĝis la lasta vico, kaj ĉie ni aŭdis la kantadon same klara kaj dolĉa. La arkitektoj informis nin, ke la akustiko en tia vasta aŭditorio ja prezentis vere novan problemon al arkitektoj kaj akustikistoj. Laŭ vidpunkto de akustiko, la plej taŭga spaco por ĉiu sidloko

estas 4 ĝis 6 kubmetroj. Laŭ tio, la aŭditorio povus havi volumenon nur de 60,000 kubmetroj. Super tio la aŭdo fariĝus malklara. Laŭ tiu rutina formulo, oni devus fari por la aŭditorio same kiel por ordinara teatro, t. e., malgrandigi la spacon klinigante antaŭen la plafonon kaj la balkonojn. Tamen, tio estigus senton de premado. Neniu el la arkitektoj antaŭe entreprenis tiel grandan konstruadon. Okazis akra disputo pri la problemo kaj post klara akceptigo de la gvida penso en arkitektura projektado, "Ĉefe por la homo, al kiu ja servas materio", ili liberiĝis el kateno de rutino kaj vastigis la pokapan spacon, kaj el tio eĉ pli graviĝis la akustika problemo. Ĉi tiun nodon tamen maligis la konstruistoj per serio da sagacaj rimedoj, provizi ĉiun sidlokon per malgranda megafono; meti skorian lanon en la plafonon kaj la murojn; bori en la plafono kelkajn milionojn da truetoj por sorbi la sonon. Tiel kiam la sonoj eliĝas el la estrado, la superfluaĵoj estas fororbitaj kaj postrestas iom da resonado, ke ili estas sen eĥo kaj samtempe ne sonas sekaj. La plej alta klareco de aŭdado en Pekinaj teatroj nun estas 80%, sed tiu en ĉi tiu aŭditorio jam superas 90%. Oni povas klare kaj ekzakte aŭdi la voĉon de parolantoj.

Kvankam la aŭditorio estas tiel alta kaj vasta, multe diferencas la altecoj de la tri etaĝoj, el kiuj la grunda etaĝo ampleksas pli ol 3,000 kv. metrojn, kaj la plej malproksima loko distancas for de la estrado 60 metrojn, tamen neniu kolono baras la vidon de iu ajn sidanto. Por faciligi la klarigon, la arkitektoj desegnis al ni skizon de la strukturo de la konstruaĵo. Super la plafono de la aŭditorio sin kaŝas dek du ŝtaltrabaroj pli larĝaj ol la nove plilarĝigita bulvarado, la Orienta Ĉang-an-strato. Unu ekstemo de ses el tiuj trabaroj kuŝas sur ferbetona trabo kun alteco de 9 metroj, kaj ĉiuj tiuj ŝarĝoj pezas sur du kolonoj ambaŭflanke ĉe la fronto de la estrado, el kiuj ĉiu povas subteni pezon de pli ol 3,000 tunoj. Kiom malfacila laborego estas la tasko plenumi tiom kolosan kaj komplikan konstruaĵon. La arkitektoj multe laŭdis la riĉan sagacon kaj kreeman laboron de la konstrulaboristoj. Estas ili, kiuj dum tiom mallonga tempo sukcesis finitian malofte videblan gigantan konstrulaboron kaj samtempe instalitiam kompleksajn modernajn ekipaĵojn de elektro, disaŭdigo, temperaturnormigo kaj televidotranssendado.

La bankedsalono estas en la norda alo de la Halo, rigardanta al la larĝa bulvarado Ĉang-an-strato, kiu pasas antaŭ Tian-anmen. Enirinte tra la norda pordo, trapasinte la marmoran kolonejon, vestiblan salonon kaj vestodeponejan salonon, oni atingas la suban salonon, kiu servas kiel ripozejo antaŭ festeno. Irante pluen, oni venas antaŭ grandan ŝtuparon el ĉina blanka marmoro, kun 62 ŝtupoj en kvin vicoj, kiu kondukas al la bankedsalono tra du flankaj koridoroj. Sur la muro kontraŭ la ŝtuparo estas grandega ĉinstila pentraĵo, motivita de la poemo "Neĝo" verkita de Prez. Maŭ Ze-dong. En la bildo, maldekstre vasta etendiĝo de neĝkovritaj montaroj kaj riveroj elvokas



Parto de la centra salono

Foto de Giang Ki-ŝeng

la version "Montvicoj dancas kiel arĝentaj serpentoj, vakselefante kuras la altebenaĵo"; dekstre la leleviĝanta suno brilas el senlima nubomaro super la patrolando, malkovrante la multajn ĉarmojn de la montoj kaj riveroj.

Alian bildon prezentas la bankedsalono kiu havas spacon por 5,000 festenantoj, ampleksante 7,000 kv. metrojn, do pli vaste ol futbalgrundo. Por lando de sescentmiliono popolo, la salono ne estas granda, sed, laŭ vidpunkto de arkitekturo, ĝi estas tamen

maloftaĵo. La salono havas altecon je nur iom pli ol 15 metroj, sed ĉar la arkitektoj tiel aranĝis ke pli alte estas ĉe la mezo ol ĉe la kvar flankoj, kaj kreis kontraston el malsamaj niveloj, ĝi donas la impreson de alteco kaj vasteco. La plej rimarkinda en la salono estas la artisma dekoracio sur la plafono kaj la koridoraj kolonoj, kiu donas al la salono eksterordinaran belecon, elspirante facilecon kaj serencon, sed samtempe ne mankas majesteco kaj eleganteco.

La arkitektoj ankaŭ gvidis nin al la kuirejoj en la orienta kaj okcidenta anguloj norde de la salono. La kuirejoj rekte komunikigas kun la du flankaj koridoroj, tra kiuj la kelneroj iras bonorde inter la festentabloj. La kuirejoj estas moderne ekipitaj. Specialaj liftoj kaj ŝtuparoj ligas la kuirejojn kun la malvarmkonservejo kaj manĝaĵo-prilaborejo en la kelo. Kuiritaj kaj ne-kuiritaj manĝaĵoj, puraj kaj uzitaj manĝiloj, ĉiuj havas sian apartan rektan komunikan linion, ne intermiksante unu kun la alia.

En la suda alo de la Halo estas la domego, kie sidas la Konstanta Komitato de la Nacia Popola Kongreso. Ĝi estas kvadrata domego kun interna korto 6,000-kvadratmetra, en kiu troviĝas razeno—ideala ejo por amasa fotografado kaj ripozado.

El la interna korto, tra arkaĵo, ni eliras el la Halo. Kiam ni finis la tuttagan pilgrimadon al la konstruaĵo, la vespera ruĝo de la subiranta suno oblikve pendas sur la Okcidenta Monto. La ruĝaj radioj verŝiĝas sur la verdajn arbojn ekster la Halo, sur la helflavajn murojn de la konstruaĵo, sur la ruĝajn murojn kaj flavajn tegolojn de Tian-anmen, formante el ĉio ĉi mirindan simfonion de rebriloj.



Vang Jun-ŝeng:

La Brilo de Ĉinio-Birmo

BIRMA Ĉefministro Ne Vin alvenis Pekinon vespere de la 24-a de jan. kaj subskribis vespere de la 28-a de jan. kun Ĉina Ĉefministro Ĝoŭ En-laj du signife tre gravajn traktatojn: la Traktato de Amikeco kaj Reciproka Ne-agreso inter Ĉinio kaj Birmo kaj Interkonsento pri la Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Birmo. De intertraktado ĝis subskribo daŭris nur 4 tagoj. Kiel oni povas ne ĝojegi, ke tiel rapide estas akirita la frukto de paco kaj amikeco por la ĉina kaj birma popoloj!

La kontraktado de du traktatoj inter Ĉinio kaj Birmo donas novan ekzemplon por la paca kunekzistado inter landoj. Tiu ĉi grava evento plene montras, ke kiuj ajn gravaj problemoj interlandaj estas solveblaj per paca interkonsiliĝo, se nur oni sincere observas la Kvin Principojn de paca kunekzistado. La Traktato de Amikeco kaj Reciproka Ne-agreso firmigis la Kvin Principojn de paca kunekzistado per konkreta formo de traktato, kaj donis novan vivon de paco kaj amikeco al la harmonia interrilato najbara, ekzistanta jam de kelkmil jaroj inter Ĉinio kaj Birmo. La dua artikolo de la traktato difinas: "La ambaŭ kontraktantaj partioj garantias solvi ĉiujn disputojn inter si per paca intertraktado sed ne turni sin al militforto." La popoloj kaj registaroj de Ĉinio kaj Birmo kune observos ĉi tiun ĵurpromeson, kaj konservos intiman amikecon kaj daŭran pacon. La tria artikolo difinas: "Ambaŭ kontraktantaj partioj garantias ne agresi unu la alian nek partopreni en milita alianco direktita kontraŭ la alia kontraktanta partio." En kontrasto al la traktato de milita alianco kontraktita inter Usono

kaj Japanio antaŭ 9 tagoj, ĉu ne estas tute klare, kiuj amas pacon, kaj kiuj fabrikas streĉan situacion kaj preparas sin al agresa milito?

La Traktato de Amikeco kaj Reciproka Ne-agreso inter Ĉinio kaj Birmo estas la unua traktato en sia speco aperinta inter Aziaj landoj. Ĝi estas tre bona nova ekzemplo. La interkonsento pri land-lima problemo inter Ĉinio kaj Birmo etas ekzemplo por racie solvi tian disputon inter Aziaj landoj. Tiu problemo inter Ĉinio kaj Birmo jam ekzistis cent jarojn, kaj nun ni ĝin racie solvis. Landlima disputo ekzistas ankaŭ inter multaj aliaj landoj, ankaŭ ili povos ĝin solvi racie, se nur ambaŭ partioj agos laŭ la Kvin Principoj de paca kunekzistado kaj prenos la sintenon de amika intertraktado. Ni firme kredas, ke ankaŭ la landlimaj problemoj inter Ĉinio kaj aliaj ĝiaj najbaraj landoj povos esti racie solvitaj sammaniere. La imperiismaj intrigistoj kaj internaciaj maliculoj, kiuj trovas siajn feliĉon kaj ĝojon en alies plago kaj akcidento, ĉiam mensogas kaj kalumnias, incitas malakordiĝon kaj semas malamon inter Ĉinio kaj ĝiaj najbaraj landoj. La kontraktado de la du traktatoj inter Ĉinio kaj Birmo trafis frape iliajn vangojn.

La kontraktado kaj publikigo de la diritaj traktatoj tuj trovis varman akcepton ĉe la popoloj de Ĉinio kaj Birmo, ĉe Aziaj popoloj kaj ĉe la pacamantaj popoloj de la tuta mondo. Tio montras, ke paco kaj amikeco estas ĉefa fluo en la nuntempaj internaciaj rilatoj, kaj la standardo de paca kunekzistado leviĝas ĉiam pli alten.

Lavange aperas publikaj opinioj el diversaj landoj bonvenige al la

Amikeco

du traktatoj kontraktitaj inter Ĉinio kaj Birmo. Precipe nin ĝojigis la ĉefartikolo en la Birma ĵurnalo "Gvardio", kiu skribis: "Ni esperas ke la spirito kiu gvidis Ĉinion kaj Birmon sukcese solvi la longtempe pendantan landliman problemon, enkorpiĝos ankaŭ en la interrilatoj por trakti siajn pendantajn problemojn inter niaj najbaraj landoj Ĉinio, Indonezio kaj Hindio." Ĝi diris ankaŭ: "Hindio kaj Ĉinio devas agi laŭ la espero de siaj malgrandaj fratlandoj. Mi vidas ke la verkinto de la ĉefartikolo de la Birma ĵurnalo "Gvardio" fidele plenumis la ĵurnalian mision, kaj mi respektive esprimas mian koran admiron kaj estimon. Mi mem estas ĵurnalisto de kelkdek

jaroj, kaj opinias ke la plej granda krimo estas instigi agresan militon. La 49-a artikolo de la Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco difinas: "Protektata estas la libero de informado de veraj novaĵoj. Malpermesataj estas kalumnio, difektado al la intereso de la ŝtato kaj popolo. Kaj instigo al mondmilito, pere de ĵurnalismo." La ĵurnalistoj de nova Ĉinio ja fidele observas tiun ĉi leĝon. Ni rigardas mensogon, kalumnion kaj instigon al monda milito kiel krimojn, sekve ni ege malamas tiujn ĵurnalistojn kiuj agas kun malpura konscienco, inversigas nigron kaj blankon, kaj servas al la militinstigantoj. Ni prenas sur nin kiel nian plenumendan mision la taskon propagandi mondpacon kaj stimulasi la landkonstruadon. Pro tio ni kore estimas ĉiujn ĵurnalistojn kiuj aktivis por la mond-paco kaj internacia amikeco.

Ĉinio estas ĵus liberigita lando, kiu dum la pasintaj cent jaroj, fariĝis duonkolonio sub la ungoj de imperiismo, kaj multe suferis de agresaj militoj, tial la ĉinaj ĵurnalistoj tre bone komprenas la valoron de sendependeco kaj la amindeco de paco. Ne parolindaj estas tiuj ĵurnalistaĉoj kiuj pri-servas la provokistojn de imperi-isma milito. La plej ĉagrena afero estas tio, ke iuj ĵurnalistoj kies patrolando travivas la saman malfeliĉon, kian ni travivis, ankaŭ faras kalumnion, dissemas mal-amon kaj instigas militemon. La vortoj de la Birma ĵurnalo "Gvardio" estas modelo de propagando por mond-paco kaj por amikeco inter najbaraj landoj, kaj estas ankaŭ valora resonado sub brilo de la du traktatoj inter Ĉinio kaj Birmo. La homaro devas vivi en paca kunekzistado, kaj la radioj de Ĉinio-Birma amikeco prilumias la vojon de paca kunekzistado inter diversaj landoj.

(Daŭrigo de p. 76)

taŭe. La diferenco estas nur tio ke antaŭe ni kunlaboradis por la nacia kaj demokratia revolucio, sed dum la pasintaj dek jaroj, por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

En la kunlaborado kun tiuj malnovaj kunbatalintoj oni ĝuas ian agrablan senton, kiu devenas de tio, ke en la malfacila cirkonstancaro dum longa militado ili kulturis al si sinforĝesemon pri la propra gajno aŭ perdo. Ekzemple, la tutlanda organizado de agrikulturaj kooperativoj komenciĝis grandskale nur de 1953, sed en tiu ĉi regiono, la kooperativigon oni eksperimentis jam en 1951 kaj disvastigis en 1952. La reciproka subtenado trans la limoj de subdistriktoj aŭ gubernioj en la akvoutiliga konstruado estas afero por la tuta lando aperinta dum la granda antaŭensalto en 1958, sed ĝi komenciĝis tie ĉi jam en 1956. Kvankam ili estas kamparanoj ne

disiĝintaj de produktado, ili estas ankaŭ revoluciaj romantikistoj. Antaŭ kiu ajn nova afero ili ne nur ne multe timemas, sed male ege interesiĝas. Kiam la armeo sub komando de Liu Bo-ĉeng kaj Deng Hiaŭ-ping transmarŝis suden de Tajhang-montaro al la regiono de Dabie-montaro por fondi novan revolucionan bazon tie en 1947, kelkdek mil civilaj helpantoj estis organizitaj el ili por partopreni en la batalado dum unu tuta jaro. En tiu unu jaro ili ankaŭ eskortis militkaptitojn armitaj per vektoj. Kelkaj eĉ restis tie por partopreni en lokaj administraciaj laboroj. Ĝis nun priparolante pri la tiamaj okazintaĵoj, ili ankoraŭ opinias ĝin tre interesa epizodo en ilia vivo. Por ili la entuziasmo manifestita en la granda antaŭensalto estas nur daŭrigo de tiu ĉi revolucia spirito, kaj neniam eksterordinara.

Dum la lastaj dek jaroj mi denove kunlaboris multe kun tiuj

malnovaj kunbatalintoj. Ni kunlaboris: de interhelpaj grupoj ĝis popol-komunumigo, de plantado kaj greftado de pomarboj ĝis liverado de pomoj al merkato, de kampanjo de likvido de analfabeteco kun manko de instruistoj ĝis starigo de propra mezlernejo en ĉiuj subdistriktoj de montogrimpado per propraj kruroj kaj letersendado per kurieroj ĝis formiĝo de sistemo de aŭtomobilaj linioj kondukantaj al ĉiuj gubernioj kaj telefona komunikado al ĉiuj vilaĝoj. Ju pli multe mi kunlaboris kun ili, des malpli multe mi povis verki. Sed mi ne opinias tion io malprofita. La socia valoro produktita de la forto oferita en praktika laboro estas neniam malpli granda ol tiu produktita de la literaturaj verkoj. Krome, ĉio serioze farita, plejparte speguliĝos poste en la verkoj kaj eble eĉ pli ĝuste. Mi volonte tiel agos daŭre.

La 23-an de sept. 1959.

En Granda Familio de Revenintaj Elmigrintoj

— La Hinglong-a Farmo de Ekselmigrintoj —

Apud sun-rivero ĝojo regas,
Regas ĝoj' kaj flamas kanto-amo,
Unu kanto la alian sekvas,
Pli sonore ol trans mont' tamtamo.
Kafosema ruĝ', cinod-aromo,
Nova hejmo estas ĉe l' marbordo,
La kabanoj iĝis tegoldomoj
Hinglong jen en tute nova ordo.

Oceano de arboj kaj maro de kantoj

La verdverdaj arboj dense ombras. La akvo de la pitoreska Sun-rivero rebrilas spegule. Ĉie la aero estas saturita de freŝa aromo kaj kantonoj ŝvebas flirtante super la ĝardenoj. La anoj de la Hinglong-a Farmo de Ekselmigrintoj estas plejparte kegia-oj*, kiuj estas tre kantemaj. Nun kiam fariĝis facila la vivo, hele lumas la estonteco kaj tiom serenas ilia koro, ĉiam ankoraŭ pli multe kaj laŭte ili kantadas.

Iutage mi veturis en aŭto por pasaĝeroj kaj ŝarĝo, muntita mem de la Farmo, al la laborejo por kulturi virgan teron. La negranda veturilo estis tute plena je materialoj transportataj al la laborejo: unu bovo distranĉita en kvar pecegojn, kelkaj korbegoj da legomoj, tri grandaj vazoj da blanka vino, granda kvanto da bananoj kaj cidonioj, kaj krome dinamo, filmo-projekciilo kaj materialoj por megafona sistemo Parceloj post parceloj da plantaĵoj rapide alproksimiĝis kontraŭvizaĝe kaj tuj malaperis pretere, dum la kurado de la aŭto. Sur la ondiĝanta kaj serpentumanta vojo la juna ŝoforo gravmiene rigardis rekte antaŭen kun kunpremitaj lipoj. Sed kiam la veturilo venis al la vojo ebena, li fariĝis vigla kaj parolema. Lia nomo estas Huang Mu-ĉun. Estante ekselmigrinto reveninta de Medano sur Sumatro, Indonezio, li havas ĉiujn karakterizaĵojn de elmigrintaj ĉinaj junuloj, kiuj kreskas en la intertropika regiono: kantema, babilema kaj tigre vigla en laborado. En la komenco de 1959 li ricevis diplomon de ŝoforo. Nun li estas vicestro de la transporta brigado. Li multe

* Kegia-o: enmigrintoj el norda Ĉinio antaŭ longe enloĝiĝintaj en Guangdong-provinco.

babilis kaj babilis, ke li fine eĉ verkis ŝunkoŭliu*: “La ŝoseojn ni mem konstruas, la fruktojn kaj legomojn ni mem kulturas, la brikojn kaj tegolojn ni mem elbakas, la kalkon ni mem preparas, la seglignojn ni mem dehakas, la domojn ni mem elfaras. . . .” Mi ne memoras bone, kiom da “ni mem” li diris sinsekve, sed ĉiel oni povas scii el lia ŝunkoŭliu, ke la bovo en la veturilo estas bredita, la fruktoj kaj legomoj estas kulturitaj, la vino estas farita, kaj ĉiuj la filmo-projekciilo, dinamo kaj la materialoj por la megafona sistemo estas aĉetitaj senescepte de la Farmo mem.

La arboj ambaŭflanke de la vojo sinsekvis senfine. Ie sur nekulturita terdekklivo plena je herbaĵoj, diligentis du traktoroj kun fabrikmanko de “Orienta Ruĝo” tirante kvinsokajn plugilojn, kiuj supren turnis la teron post si en ondantajn nigrajn sulkojn.

Same kiel en aliaj lokoj, ĉie en la kulturejo de virga tero ŝvebis kegia-aj popolkantoj:

Mi kantas laŭvole kaj ĉiam elkore,
Leviĝas en eĥ' Sun-rivera ondaro.
Pro vivo feliĉa ni penas fervore,
Ne povas nin bari la virga arbaro
Herooj alvenas al lokoj dezertaj,
Ekfosas plenforte la grundon kun peno,
Kaj teron renversas per manoj tre lertaj
Por ke venontjare abundu la greno.

Ĵus paŭzis la kanto en la oriento, jam komenciĝis alia en la okcidento:

Pionire kuras feraj bovoj,
Tintas sokaj klingoj post traktoroj.
Kolektiĝas ĉiuj konkurantoj,
La venkinton glorie kronos floroj.
Ruĝas la ĉielo de l' aŭroro
Hejmon ni konstruas per laboro,
Nur laboro donos bonan vivon
Al ni ĉiuj en la kolektivo.

En formo de popolkantoj la farmanoj montras sian heroismon, prikantas sian feliĉan vivon kaj esprimas sian kredon kaj decidemon por konstrui siajn socialisman patruon kaj belajn hejmojn.

* Ŝunkoŭliu: flua parolo en versoj kun libera rimo kaj tre populara.

La dankemo de la novaj farmanoj

En la Hinglong-a Farmo mi vizitis la hejmojn de kelkaj novaj farmanoj ĵus revenintaj antaŭ nelonge de Indonezio. Ili estas inter la 78 familioj, kiuj venis al la Farmo por partopreni en socialisma konstruado de la patrio dank' al la monhelpo de la Komitato pri la Aferoj de Elmigrintoj de Guangdong-provinco. Kvankam iliaj profesioj kaj familia vivo estis malsamaj en la pasinteco, tamen sama sorto ilin trafis: En eksterlando ili estis tiel mizeraj ke ili devis vagadi ĉie senprotekte, ĝis ili revenis al la hejmlando, kaj trovis varman akcepton de la patrio, kies ĉiamaniera prizorgemo ilin profunde kortuŝis, ke ili decidis konstrui sian feliĉan vivon en sia propra patrolando.

La familio de Kiu Kin-he, kiu ĵus revenis de Pontianako, jam ekloĝiĝis en la Tria Labor-sektoro. Liaj plej juna filo kaj nepino, kiuj revenis kune kun la maljunaj geedzoj jam eniris en Hinglong-an Elementan Lernejon. Lia dekokjara filo, kiu estas muta, surda kaj noktblinda, ankaŭ ricevas konvenan prizorgon de la Farmo. El liaj aliaj du infanoj, kiuj revenis pli frue, unu estas baldaŭ finonta sian lernadon en Jangĝou-a Universitato kaj la alia lernas en supera mezlernejo en Nankino. Ke la tuta familio revenis en la grandan familion de la patrio kaj ricevis konvenan prizorgon, tiel tuŝis la maljunan ekselmigrinton, kiu loĝis en eksterlando dum kelkdek jaroj. Ĉiam ajn, kiam li renkontas siajn samprovincanojn, li diradas emocie: "Kian meriton ni havas, ke ni ricevas tian prizorgon de la patrio?" Plurfoje li iris al la sektora oficejo, por peti pli multe da laboro, ke li povus dediĉi sian forton pli bone al la socialisma konstruado de la patrio. Li diris: "Prizorgo de la plantejo de pipro-arbetoj estas laboro efektive tro malpeza. Lasu min labori same kiel la malnovaj farmanoj. Tion bone repagi la favoron, mi povas, kaj mi volas kiun la patrio donis al mia familio." Alia ekselmigrinto Feng Ĝang kaj lia edzino, ambaŭ kvindek-sep-jaraj, revenis de Indonezio kun siaj ses infanoj, inter kiuj la plej aĝa estas la dekkvarjara filino. La tuta familio nun ne plu suferas malsaton


kaj malvarmon. La tri pliaĝaj gefiloj ankaŭ vizitas lernejon. La maljuna paro ĉiam diras: "Kiel ni kuraĝis imagi antaŭe, ke niaj infanoj povos viziti lernejon! Se ni sciis pli frue, kiel bona estas al ni la patrio, ni estus delonge revenintaj hejmlandon." Ĝu Ja-jong, kiu revenis de Bilitono, estas nun teknika laboristo en riparejo de aŭtomobiloj. "Kiam ni estis en fremdlando," li diris ridante, "ni estis ĉiam maltrankvilaj post la laboro, nesciante kiam malfeliĉego subite trafos nin. Nun ni estas tute senzorgaj. Kvar el niaj ok gefiloj vizitas lernejojn. Ni ne plu ĉagreniĝos ĉu pro manĝo kaj vesto, ĉu pro la estonteco de niaj idoj. Oni povas trankvile dormi kun pordego ne fermita dum la tuta nokto. Tia paca vivo ja plilongigos la vivon je jaroj."

La malnovaj farmanoj esprimas siajn aspirojn kaj idealojn per popolkantoj kaj la novaj farmanoj elversas sian senton el la korfundo. Ambaŭ malnovaj kaj novaj farmanoj kune penas konstrui sian novan hejmlokon en plena akordo.

La malnovaj farmanoj esprimas siajn aspirojn kaj ekselmigrintoj. En la cirkonferenco de dekkaj kilometroj la plantaĵoj dense kreskas kaj la domoj staras unu apud la alia en seninterrompaj vicoj. Ĝi estas la paradizo de socialismo kaj la granda amikeca familio de la revenintaj ekselmigrintoj. La pordego de la paradizo estas vaste malfermita por bonvenigi kaj akcepti ĉiujn revenintajn ĉinojn, kiuj pretas ĝin konstrui.

Membroj de Hinglong-a Farmo ekskursas dimanĉe

Foto de Hju Jing



Rememoroj pri mia iro al kamparo

REMEMORI la pasintajojn okaze de solena festo jam fariĝis komuna kutimo. Je la sojlo de la dekjara datreveno de la fondiĝo de nia Ĉina Popola Respubliko, mi volus ion skribi pri mia iro al kamparo. Kia hazardo! La historio de mia iro al kamparo havas ankaŭ ĝuste dek jarojn—ĉar antaŭ dek jaroj mi ja vivadis tie, sekve ne povis temi pri iro al kamparo. Nur ekde 1949, kiam mi alvenis al nia ĉefurbo Pekino, mi nomis iro al kamparo mian denovan revenon al la kamparo.

Alveninte al Pekino, mi okupiĝis en certaj laboroj kun loka karaktero. Mi intencis iom ekoni la lokajn cirkonstancojn kaj preni Pekinon kiel mian novan bazon. Sed post ekprovo mi tuj trovis, ke fondi bazon de verkado ne estas tiel facile. Komprenoble oni povas ankaŭ sukcesi en iu ajn malfacila laboro kun pli da peno, tamen mi pensis, ke ne estas inde forlasi la jam al mi profunde konatan lokon por ekkoni de komenco iun novan, ne tiom facile koneblan, ĉar tio postulos pli da penado kontraŭ malpli da efiko. Tial mi decidis denove iri al kamparo.

La ĉefurbo, kiu estas nia centro de politiko kaj kulturo, estas sendube aminda, sed la kamparo, la produktaĵo de greno, kotonoj kaj oleplantoj, estas ankaŭ aminda. Demandi kiu el la du estas pli aminda similus demandi, kiu estas pli aminda, la lotuso aŭ la krizantemo, ĉar objektoj de malsmaj specoj estas ne kompareblaj. La verkisto ne devas esti sklavo de sia intereso, sed ĉiuokaze li devas ĉiam havi plenan intereson pri la bazo, kie li ekkonas la popolan vivon. Eĉ laŭ vidpunkto de

materia vivo, la urbo kaj la kamparo ambaŭ havas siajn proprajn amindaĵojn. Ekzemple, la kamparanoj—kiam ili kunvenas vespere sur la draŝejo, sidas ĉiuj sur la pajlo-faskoj. Tiaj sidlokoj donas al la sidantoj iun specialan senton de komforto. Kaj al ili eble ne povas egali seĝoj de la Pekina Laborista Klubo—komprenoble se oni metus pajlofaskojn sur la planko de la Laborista Klubo, ili certe ne tiel konvenus kiel la seĝoj, ĉar malsamajn objektojn oni ne povas interŝanĝi. Plie, se iu antaŭurba kamparano deŝiris duonmaturajn maizspikojn la antaŭan tagon kaj vendas ilin kuiritajn en urbo la duan tagon alia kamparano, la aĉetanto tuj rimarkos ĉe la unua mordo, ke la maizospiko estas de la antaŭa tago. Sed la urbanoj ĝenerale ne havas ŝancon manĝi freŝajn samtage deŝiritajn spikojn, ili, sekve, ne povas distingi la bonguston de freŝa maizo. Komprenoble la urbanoj manĝas tre gastromie sed ili ne havas tiom de ŝancoj por manĝi freŝajn legomojn kiom la kamparanoj. De infanaĝo mi havas stomakon kutimiĝintan al milio kaj du krurojn lertiĝintajn por montogrimpado. Tiujn du fiziologiajn kvalitojn mi neniam lasos degeneri. Eble iuj opinius, ke la materiaj kondiĉoj pliboniĝos, kaj oni bezonos nek manĝi milion nek grimpi montojn, sed mi pensas, ke eĉ tiuokaze, la kutimo de montogrimpado kaj emo manĝi milion ne estos ia malbono.

La idilia vivo ja estas alloga por mi, tamen pli alloga estas la homoj, kun kiuj mi longe kunlaboris. Tajhang-montaro estas malnova liberigita regiono. Dum la periodo de nacia kaj demokratia revolucio, la tieaj kamparanoj kune kun ni kontraŭbatalis la malami-

kojn enlandajn kaj eksterlandajn, kaj likvidis la ekspluatantan sistemon de la bienula klaso. Tiutempe mi ne nur kunlaboris kun ili, sed ankaŭ priskribis tiujn iliajn luktojn. Pro tio mi rigardis tiun ĉi lokon mia bazo por koni la vivon de la amaso. Kiam en 1951 mi denove venis al la montvilaĝo, kie nia institucio iam trovis sian restadejon dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, la plantaĵoj kreskis tiel verdaj kiel antaŭe kaj la hejmlokaj manĝaĵoj restis tiel plenaj de hejmloka gusto kiel antaŭe. La sola diferenco estis tio ke la spirito de la vilaĝanoj estis multe pli vigla ol antaŭe—ĉar ni havas nun propran centran registaron, ili bonvenigis min, la reveninton malnovan konatulon, kun sinteno de triumfintoj.

Mi skribis aliloke, ke la metodo per kiu mi ekkonas la kamparan vivon estas “kunlabori kun la kamparanoj”. Prezidanto Maŭ al ni instruis: “Nur tiu, kiu faras sin lernanto de la amaso, povas fariĝi ilia instruanto.” Mi trovas ke kunlaborante oni ja povas plej bone fariĝi samtempe kaj lernanto kaj instruanto. Prezidanto Maŭ volis ke ni iru en la amason por “observi, sperti, esplori kaj analizi ĉiujn homojn, ĉiujn klasojn, ĉiujn amasojn kaj ĉiujn vivecajn vivmanierojn kaj luktomanierojn...” Ŝajnas ke kapturite kompleksaj estas tiuj multaj “ĉiuj”, kaj ne facile trakteblaj ĉiuflanke, sed, fakte, se oni longe kunlaboradas kun la amaso, neniu flankon oni povus preterlasi, eĉ intence. La reala socio ja estas kompleksa. Dum la dekjara vivado post mia iro al kamparo, mi nur daŭrigis la kunlaboradon kun la homoj, kun kiuj mi jam longe kunlaboris an-

(Daŭrigo sur p. 73)

Hejmon Revenis Arto

KELKAJ junuloj admiras la titolojn de “Past-statuisto Tang”, kaj “Argil-statuisto Ĝang”, kaj rigardas nin kiel popolartistojn diferencajn de la aliaj. En efektiveco, ni havis ja tute saman sorton kiel ĉiuj aliaj popolartistoj subpremataj kaj ofendataj dum niaj pasintaj kelkaj viv-jaroj antaŭ la Liberiĝo. Kun iom da famo, ni pli ofte fariĝis viktimoj de la ekspluatanta klaso.

Mia avo Ĝang Ming-ŝan ŝatis modli argilan figuron ekde sia infanaĝo. Kiam li famiĝis, li altiris la atenton de iu nobelo nomita Jing, kiu ŝategis la argilajn statuojn de mia avo, kaj volis monopoligi lian arton. Kiel dirite inter la ekspluatanta klaso: “Se en la mondo estas tiel ĉarma belulino, ŝi certe devas veni al la reĝo kiel kunulino,” ankaŭ arto devas preservi nur nobelaron. Jing devige

venigis mian avon en sian domon por sin amuzi por lia figurmodlado la tutajn tagojn. Mia avo estis tiel retenita kaj ne permesita foriri de la nobela domego. Li devis modli ĉion kion Jing volis. En nur malmultaj tagoj, li modlis figurojn de ĉiuj domanoj de la nobelo, de supre ĝis malsupre, de infanoj ĝis aĝuloj, kaj eĉ de liaj ĉevaloj. Ĉiam, kiam venis gastoj, aŭ Jing intencis prezenti al iu donacon, li tuj devigis mian avon laboradi. Mia avo vivis tie tre ĉagrene. Li pensis ke, li vivtenis per la arto kaj ne agis kontraŭleĝe, kial li devas servi al tiu nobelaĉo sola? Sed li ne kuraĝis spiti la nobelon. Post longa tempo, mia avo sukcesis elpeti forpermeson, pretekste por revidi sian hejmon, kiun li forlasis jam por longa tempo, kaj eskapis al Ŝanhajo sin kaŝante tie tri aŭ kvar jarojn ĝis kiam la nobelo Jing ne plu lin

serĉis. Nur tiam li kuraĝis reiri hejmen. Jen vidu, en tiu tempo eĉ ia originala arto de popolartistoj neeviteble fariĝis ĉasajo de la nobeloj!

En mia tempo, la kondiĉoj ne pliboniĝis. Ĉiuj kiuj iel rilatetis kun la reganta klaso, rajtis al mi kriaĉi kaj ordoni, kvazaŭ ni vivus speciale por ili. Iufoje, unu policano venis en mian ĉambron kun grandsinjoraj manieroj kaj laŭte min alparolis ĉe ekmalfermo de la buŝo: “Mia patrino adoras Budaon. Modlu por mi statuon de bodisatvo. Kiam ĝi povos esti preta?” Li diris tute simple la vortojn eĉ sen ia “bonvolu”. Mi respondis, ke mi estas tre okupata, ĝi estos preta post dek tagoj. Li ne konsentis, dirante ke lia patrino estas kolerema kaj insistante ke la statuo devas esti farita pli frue. Post longa traktado, fine venis al konsento ĝin ricevi en sep tagoj. Kaj en la tago li venis frumatene, prenis la argilan statuon kaj ĝin ekzamenis ree kaj ree, kaj fine diris: “Bone, tre bone, tute ne malbone, per nenio mi dankas.” Antaŭ ol mi povis respondi, li jam foriris kun la statuo, tute ne konsiderante la prezon kaj la laboron kiun mi faris.

Estis ankoraŭ alia okazajo kiun oni tute ne povas imagi: La lernejoj — manfaradoj por la infanoj de altrangaj oficistoj kaj influhavaj personoj fariĝis ankaŭ la niaj. Nu, kia estis la afero? En fino de la lerna semestro aŭ kiam la instruistoj asignis manfaradojn al lernantoj, iliaj familestroj venis al mi, devigante min ĉesigi miajn aliajn laborojn kaj fari lerneajn taskojn por iliaj infanoj, por ke la lastaj ilin portu al la lernejoj kiel memfaritajn.

Feliĉa vivo en maljunula hejmo

Argilaj statuoj faritaj de Ĝang Ming, pranepo de Ĝang Ming-ŝan





Argilstatuisto Ĝang Ĝing-hi, nepo de Ĝang Ming-ŝan, instruas al siaj gelernantoj kolorigadon de argilaj statuoj *Foto de Liang Ji-ding*

Ĉu tio ne estas trompajo? Pri mia perdo, kaŭze de neplenumo de aliaj mendoj, mia elspezo por modlaj materialoj de 1' lernejoj taskoj ili tute ne zorgis.

Mi estis tiel ekspluatata, ke multon mi povas rakonti. En la daŭro de kelkdek jaroj, mi neniam povis senĝene studi la modlan arton, kun facila spirado kaj malpeza koro.

Finfine venis la sopirata tagiĝo, post alveno de komunistoj, ĉio plene ŝanĝiĝis. La registaro prizorgas kaj alte taksas ĉiun specon de arto. Precipe ĝi bone traktas nin maljunajn artistojn — ne parolu jam en kia grado ĝi estas. Ni ricevas altan salajron, kaj komfortajn vivajn kondiĉojn. Antaŭ la Liberiĝo, kiam mi loĝis en Tiangin, mi estis foje apenaŭ ne mortigita de disfalo de mia kaduka domo. Nun mi loĝas en dua-taĝa domo kun ĉiuj necesaj instalaĵoj. Ĉar ni estas maljunaj, por ke ni ne laciĝu, la registaro ofte asignas por ni ripozajn tempon kaj lokon. Mi ĝuis ripozon jam en la Somera Palaco, Bejdajhe, la Okcidenta Montaro En la komenco de la lasta aŭgusto mi ĵus revenis de la Okcidenta Montaro, kie mi ripozis kelkan tempon. Kiel feliĉan vivon oni ĝuas! Antaŭ la Liberiĝo, kiu zorgus nin

kiam ni estus maljunaj aŭ mortintaj?


La plej ĝojiga afero por mi estas tio, ke la Partio provizis nin per bonaj laborkondiĉoj. Mia laborejo estas vasta kaj lumplena, ekipita per vaporvarmigilo en vintro kaj elektra ventumilo en somero. Tio estas ne komparebla kun la tiutempaj laborkondiĉoj de mia avo,

kiu devis sidi sur terlito kun sia kapo kliniĝinta tiel proksime al la ole-lampo kiu lumis malhele per unusola maldika meĉo, ke liaj brovoj estis ofte kovritaj per tavolo da fulgo.

La folkloro arto dekomence estas proprajo de la popolo. Ĝi devas speguli la popolan vivon kaj esti laŭ la popola gusto. Sed en la pasinteco, kontraŭe, multaj novaj temoj ne povis esti studataj kaj disvolvataj. Nun, la arto jam revenis al sia hejmo kaj estas vere redonita al la popolo. La Partio konstante nin kuraĝigas krei, kuraĝe speguli la realon kaj plivastigi la enhavon. Por faciligi nian lernadon kaj ekkonon de la vivo kaj moroj de diversaj lokoj, favore al nia figurmodlado, oni havigas al ni multajn okazojn viziti diversajn lokojn. Kun letero de rekomendo, kien ajn mi iras, mi ricevas varman akcepton kaj helpon de tieaj aŭtoritatuloj kaj kamaradoj, ĉie mi estas kvazaŭ en la propra hejmo. Nelonge post la Liberiĝo, la Partio sendis min en la Instituton de Belartoj, kie mi studis kelktempe por ke mi pli-perfektigu mian arton. Antaŭe,

Ĝojo pro Abunda Rikolto

Argil-statuo de Sun Baŭ-hua, 19-jara lernanto de Argil-statuisto Ĝang.



ni de tri generacioj ne sciis trovi la centron de gravito de staranta aŭ kaŭranta figuro, ni devis fari ion alian por ĝin apogi. Post studado, mi scipovis jam modli figuron en iu ajn pozo sen apogilo.

Mi sentas ke mi estas nun vere feliĉa, kaj ĉagreniĝas nur pri tio ke mia laboro ankoraŭ ne estas sufiĉe kontentiga. Miaj lernantoj, kompreneble devas esti ankoraŭ pli feliĉaj ol la homoj de nia generacio. Ili estas amatoroj de argila modlarto el diversaj lokoj, jam iom sciantaj pri modlado. Pliparte el ili estas membroj de la Ligo de Komunisma Junularo, kaj kun certa klereco. Certe, ili el-lernos tiun arton multe pli rapide ol ni en la pasinteco. Tio ankaŭ montras, ke la pozicio de popola arto nun multe leviĝis, dum la

pasinteco kiu legsciinto turnus al ĝi atenton. La nivelo de malnova popola arto de argila modlado, sub la flegado de la Partio, ankaŭ multe altiĝis kaj malkovriĝis la sistema leĝaro de tiu ĉi arto. La lernantoj povas komenci sisteman lernadon de la fundamentaj principoj, kaj la instruistoj donas lecionojn al siaj lernantoj, plene kaj detale, sen ia rezervo. Estas multe pli favore al la nunaj lernantoj ol al ni, kiuj lernis kaj laboris blinde en la pasinteco nur el spertoj sen teoria gvido. Tiam, nia majstro povis doni instruon pri lertajoj nur de unu skolo, dum la instruaj materialoj kiujn ni uzas nun estas sintezo de karakterizoj kaj spertoj de multaj veteranaj popolartistoj, en kiu estas inkluzivitaj ĉiuj elstaraj teknikaj esencoj. Kiom

ideale estas nun, ke oni povas el-lerni ilin ĉiujn senmanke en sama tempo.

Ni ŝuldas dankojn al la Partio. Estas la Partio kiu donis al ni veran liberon, indan pozicion kaj la arton mem. Mi ofte pensas ke la Komunista Partio donis al mi ĉion, ankaŭ mi devas dediĉi ĉion al la Partio. Mi volas aktive efektivi la Partian direkton de la artoj tutanime kaj plenforte instrui la lernantojn. La Partio min kulturis kaj mi devas ankaŭ plenumi la taskon kiun la Partio konfidis al mi — kulturi la duan generacion de argilmodlistoj.

** Fama ĉina artisto de argilmodlado de la tria generacio de "Argilstatuisto Ĝang", kies kreaĵoj estas plurfoje ekspoziciitaj en alilandoj.*



Bona Onjo

— Infankanto el Siĉuan-provinco —

Ilustris Ĝaŭ Ĵuj-ĉun

Malgranda turto kver-kveras ĝoje,
alvenas al ni bon-bona onjo.

Ŝi manĝas kun mi el sama poto,
kaj loĝas kun mi en sama domo.

Dumtage iras ŝi kampkulturi,
en hejm' balaas, kaj nutras porkojn,
kaj min instruas en liberhoroj
kaj panjon helpas por fari vestojn.

Maldolĉe? — panjo al ŝi demandas.
Ŝi diras: ne, ne, tre tre feliĉe.

Ĉu vi demandas, ŝi kiu estas?
Ŝi estas urba kadrino bona.

Lio = ½ kilometro.


Ĉe la puto

— Popolkanto el Hebej-provinco —

Ilustris Gu Juan

Geamantoj korligataj
Kune turnas akvoradon.
Fraĉjo kuras, franjo sekvas,
akvorad' arĝenton vomas.
Unutage mil da lioj*
ĉirkaŭ puton ili iras.
Font' profunda ĉiam fluas.
pli profundas am' ilia.

Trad. Venlo Fon



La Plej Bona Verso



Aŭditorio
ŝutas
demandojn piksonajn,
Konsternas min
per skribajetoj diversaj.
— Kamarado Majakovskij,
deklamu
plej bonajn
el viaj
linioj versaj. —
Honoron doni
al kiu lini? —
Ne povas
decidi
mi mem.
Ĉu eble
tiu konvenas pli
aŭ eble
alia poem? —
Mi longe
kaj vane
meditas pri
ĉi temo,
kaj mutas
la hal'.
Kaj jen
al mi diris
la sekretari'
de "Nordlaboristo" —
la loka ĵurnal'.
Kaj mi,
forgesinte
pri poezia tono,
kriegis
pro ravo kaj gaj':
— Kamaradoj!
Laboristoj
kaj trupoj de Kantono
venkis
en Ŝanhaj! —
Kvazaŭ
mane premata
lada foli' —
kreskas bruo
de arda aklam'.
Kvin,
dek,
dek kvin minutojn kaj pli
Jaroslavlo aplaŭdas jam.

Kvazaŭ
ŝtormego
la verstojn sturmas
responde
je Chamberlain-memorando
kaj siajn ŝtalajn faŭkojn
deturnas
la krozoŝipoj
de ĉina marrando.
Ne komparos mi
polvon
de vorto poeta,

Oriente de l' Vilaĝo...

— Popolkanto de Taj-nacio —


Ilustris Ĝang Guang-ju

Oriente de l' vilaĝo estas akvorezervejo
taŭga por fluganta birdo vidi sian bildon.

Ho, bonkora junulino,
Ĉu ĝi estas via la spegulo?

Okcidente de l' vilaĝo estas ŝtupar-kampo,
tiel alta, ke ĝi tuŝas ĉielrandajn stelojn.

Ho, Feliĉo,
ĉu ĝi estas ŝtupetaro por vi veni en la homan
mondon?



ajnan gloron
 de ajna subtila geni',
 ne komparos
 kun simpla
 ĉi fakto gazeta,
 se
 ĉi tiel
 ĝin oni
 aplaŭdas ĉe ni.
 Ĉu ekzistas
 kunligoj
 pli fortaj kaj ravaj

ol ĉi kun'
 abeluja
 de laborfamilioj?!
 Aplauĉegu,
 teksist' jaroslavla,
 al bravaj,
 nekonataj
 kaj karaj
 ĉinlandaj kulioj.

Esperantigis K. Gusev



Lotusaj Folioj

— Infan-kanto el Hebej-provinco —

Ilustris Gang Guang-ju

Lotusan folion rondan kaj grandan
 mi prenas por uzi kiel boaton.
 Mi remas kaj remas, remas kaj remas,
 transiri riverojn ĝin mi dependas.
 Transporti la fraĉjon al konstruejo,
 transporti la franjon al kotonkampo,
 transporti la paĉjon arboplantejon,
 transporti la panjon sendi manĝaĵon,
 mi remos ĝusttempe tagon post tago,
 plenumos la taskon sen erarfaro.

Trad. Venlo Fon

Malpura Ĉiuj Ŝin Rigardas

— Popolkanto el Hubej-provinco —

Ilustris Mi Gu

Siajn harojn kombis brile-glate,
 siajn vangojn ŝmiris ŝi pomade,
 sed malpura ĉiuj ŝin rigardas,
 ĉar laboron fuĝis ŝi malŝate.

— Trad. Honfan



Survoje al malgrandaj altfornoj

LA larĝaj ŝoseoj interplektiĝis kiel reto. Krome, ili estis ĉiuj samformaj. Kvazaŭ en labirinto, mi vane iradis ĉiudirekten. Fine, la kruroj komencis min dolori kaj, senesperigita, mi eksidis ĉe la rando de la vojo.

Iom poste, de la sama direkto alvenis ĝaj-miena, altkreska junulo, kiu marŝis per nek urĝemaj nek malrapidaj paŝoj kaj kun libro sub la brako. Mi tuj stariĝis kaj iris renkonte al li, demandante: “Bonvolu indiki al mi, kamarado, kiun vojon mi devas preni por atingi la ferfandojn.”

“Al la malgrandaj altfornoj? Iru kun mi; mi ankaŭ tien iras.”

Mi tuj lin sekvis kaj iris kun li ŝultron ĉe ŝuldro.

“Fakte, la malgrandaj altfornoj estas plej facile troveblaj. Jen, tie, sub la altaj fumtubegoj.” Diris la junulo, marŝante, kaj samtempe montris antaŭen per la mano.

Kiam mi turnis mian rigardon al la direkto de li montrita, mi trovis ke staras ne malproksime vico da fumtubegoj. Sed mi obstine skuis la kapon.

“Ĉu malgrandaj altfornoj povas havi tiajn fumtubegojn?” Mi jetis al li nekredeman rigardon.

“Eble vi la unuan fojon alvenas ĉi tien?” Al mia demando li ne rekte respondis.

“Ne! Mi jam venis lastjare, en la tempo de la grandskala produktado de fero kaj ŝtalo. Mi eĉ gisis feron ĉi tie ĉe unu el indiĝenaj fornetoj!”

“Ne mirinde, pasis jam unu jaro!” Laŭ lia vorto, tiu jaro daŭrus kvazaŭ tutan duon-jarcenton. “Grandaj estis la ŝanĝoj, kiuj okazis ĉiutage, por ne paroli jam pri unu jaro! Antaŭ tri monatoj ne ekzistis eĉ tiuj ĉi ŝoseoj.”

Li diris la veron, ĉar pasintjare kiam mi partoprenis la laborojn de la grandskala produktado de fero kaj ŝtalo, ĉi tie troviĝis nur unu vojeto, kiu kondukis rekte al la indiĝenaj fornetoj. Se ne estus nun la araneajo de nove konstruitaj ŝoseoj, mi certe ne perdus la vojon. Sed, kiom ajn grandaj estus la ŝanĝoj, ĉu la indiĝenaj fornetoj povus havi fumtubegojn?

“En januaro ĉi-jare, oni efektivigis kvin fiksojn* por la indiĝenaj fornetoj, kaj post tiam, ĉiuj fornetoj ĉi tie estis rekonstruitaj en malgrandajn altfornojn modernajn. Ĉi tiuj bezonas varman blovon kaj ankaŭ gason. Kion fari, se ne kun grandaj fumtuboj!” li klarigis.

Por diri veron, mi jam vidis grandajn altfornojn en Anŝan-a Ŝtala kaj Fera Kompanio, kaj ankaŭ persone gisis feron per indiĝenaj fornetoj, sed la malgrandajn modernajn altfornojn, mi efektive ne vidis ĝis nun.

“Kiom da ferminaĵoj vi donas en ĉiun komplekson da materialoj? Mi demandis kun tono de spertulo.

“Ni alprenas la metodon de malgrand-kvanta material-donado: cent kvindek kilogramojn ĉiufoje.”

“Cent kvindek? Ĉu vektoporportebaj por homo?” Mi rigardis lin kun miro.

“Vektoporporti? Kial necesas ilin porti per homo? —Li ankaŭ min rigardis kun miro—Jam delonge ni uzas vinĉon por aldonadi materialojn, kaj troviĝas nun ĉe la supro de la forno eĉ duobla kloŝo, kaj neniu devas labori tie supre.”

“Nu, kaj la blovado? Ĉu oni tirpuŝas per mano aŭ pedalas piede?” Mi demandis kun granda intereso, ĉar mi okupis min ekskluzive en la tirpuŝado de blovilo, kiam ni fandis feron en la lasta jaro.

“Tirpuŝi per mano? Por kio tio taŭgus? Ĉiuj bloviloj ja senescepte estas movataj per elektraĵoj motoroj. Nun ni aplikas la metodon de varma kaj forta blovado. Por ĉiu forno oni eĉ devas funkciigi samtempe plurajn blovilojn elektraĵojn, kion povus fari permana blovilo?”

Mi ekridetis, por kovri mian konfuziĝon. Kun miaj treege limigitaj scioj pri fergisado, mi ne plu kuraĝis ludi mian laikan hakilon antaŭ vera ĉarpentmajstro, kaj rapide ŝanĝis la temon:

“Ĉu vi iras al la laboro?”

“Ne, mi iras al la teknika kurso.” Li respondis kaj pasigis al mi libron de sub la brako.

Mi ĝin akceptis. Estis teknika libreto pri la gaso uzata por malgrandaj altfornoj. Subite saltis al miaj okuloj konata nomo, presita en malgrandaj ideografiaĵoj: “Verkita de Hu Hiaŭ-ven.”


“Hu Hiaŭ-ven, Hu Hiaŭ-ven...” Mi murmuris ripete la nomon.

“Ĉu vi konas lin?”

“La nomo ŝajnas al mi sufiĉe konata...”

“Li estas estro de la forno de ruĝa flago.” Mia kuniranto klopodis helpi min rememori. “Tiun oni kromnomis ‘du’ montriloj...”

“Du montriloj?” Mi ekrememoris. Ĉu ne estas tiu diketa vilaĝa junulo? Kiam komenciĝis la grand-



La Fer-ŝtala Fabriko de Maanŝan Boliĝas

Lignogravuraĵo de Ji Ĝen-seng

skala produktado de fero kaj ŝtalo, li ĵus venis ĉi tien el sia hejma vilaĝo, kiu situas en izola montaro. Tiam, jam 21-jara, li la unuan fojon vidis propraokule la vagonaron. Tutan tagon li ĝenadis min per centoj da demandoj, kiaj: kial aŭtomobilo ne bezonas karbon? kial la elektra lampo ne bruliĝas? ..., ke mi ofte ne povis elliberiĝi. Dum la divido de laboroj, li memvole petis la laboron de enforningo de materialoj. Kiam la gisado komenciĝis, li rigardadis la malgrandan vektorloĝon kaj ŝutis materialojn en la fornon, de tempo al tempo preskaŭ senpaŭze. La forno estis tiel plena, ke ĝi preskaŭ ŝtopmortiĝis. Kaj li mem ankaŭ tiel laciĝis, ke la vizaĝo estis plene kovrita per ŝvitgutoj.

Ĉiuj plendis ke li donis tro rapide la materialojn:

“Vi devas ilin donadi ĝustatempe, ĉiun fojon post dek minutoj.”

“Jes, kaj mi donis eĉ nur post dudek minutoj ĉiun fojon. Sed la horloĝo iras tiel rapide ke mi apenaŭ povis ĝin sekvi!” Li urĝeme sin senkulpigis, montrante per mano la vektorloĝon.

Kiel povas esti, ke dudek minutoj pasis tiom rapide? Ĉiuj miris kaj alproksimiĝis al la horloĝo por ĝin rigardi. Kaj oni ekkomprenis, ke li prenis la sekundmontrilon por tiu de minuto. Ĉiuj turnis sian rigardon sur lin pro lia riproĉinda kaj samtempe ridinda eraro. Ruĝiĝinte de honto, li klarigis:

“En nia vilaĝo estas nur kelkaj grandaj horloĝoj kun du montriloj. Tiun ĉi kun tri montriloj mi vidas ankoraŭ la unuan fojon.”

Tiel disfamiĝis lia alnomo “du montriloj”.

Sed kiel la “du montriloj” ekverkis libron? Kaj eĉ teknikan! Ju pli mi cerbumis, des pli fariĝis enigma la demando.

“Estas elgisita! La malgrandaj altfornoj ne nur feron gisas sed ankaŭ homojn!” Mia kuniranto versaĵne eldivenis, kion mi pensis, kaj komencis rakonti al mi pri la detaloj.

Ĉi-jare, en januaro, post kiam la kvin normoj estis plenumataj por la indiĝenaj fornetoj, oni devis laŭ la plano starigi antaŭ ĉio kelkajn malgrandajn modernajn altfornojn. La konstruado de la fornoj estis ĉiuokaze ne malfacila, ĉar oni povis simple konstrui laŭ pretaj projektdesegnoj, kiuj cetere ne mankis, kaj ĉio estis aranĝita. Sed malfacilaĵo aperis poste. La malgrandaj modernaj altfornoj multe diferencas de la indiĝenaj. Sole ĝia polvsenigilo jam havas la grandecon de tri aŭ kvar indiĝenaj fornetoj kune. Plie la modernaj fornoj devas repreni la gason kaj bezonas varman blovon. De la estroj ĝis la laboristoj, neniu sciis kiel oni devas fari kun ili. Fine, oni decidis sendi Hu Hiaŭ-ven lerni en proksima granda fergisejo. Kvankam Hu lernis nur dum sep tagoj, ĉar li antaŭe jam iom sciis pri fergisado per malgrandaj indiĝenaj fornoj, kaj helpemaj estis tieaj laboristoj, li ellernis multon. Li jam sciis aranĝadon de forno, kunmikson de materialoj, ekhejto de la forno, k. a. ... kaj revenis kun tuta serio da teknikaj materialoj.

Nia moderna forno estis ekhejtita. Ĉe la komenco, ĉio iris bone. Tra la rigardaperturo de la forno oni vidis ke interne la fajro blanke ardas kun alta

temperaturo. Nun alvenis la horo por enkonduki la gason. Hu Hiaŭ-ven gvidis la laboron laŭ la metodo de li lernita. Li malfermis la valvon de la gaskondukilo. Sed, momenton poste, eksonis forta tondro kaj maso da blueta flamo elŝprucis el la polvsenigilo. La gaso eksplodis kaj la polvsenigilo estis difektita. Malsukcesis la funkciigo de la forno.

Post la akcidento de la gaseksplodo, Hu ploris ĝis ŝvelis al li la palpebroj. La sekretario de la Partia ĉelo iris lin konsoli.

“Ne estu malĝoja! La plej grava afero estas trovi la kaŭzon de la eksplodo.”

Hu tuj iris konsulti siajn materialojn, en kiuj li legis ke por enkonduki la gason ĉe granda moderna altforno oni uzas vaporon. Tamen kiamaniere oni povas enkonduki la gason ĉe la malgranda altforno kiu vaporon ne havas? Hu aĉetis amason da libroj pri fergisado, sed neniu el ili tuŝis tiun problemon.

“La libroj nenion diras pri tio!” Li plendis antaŭ la sekretario kun malgaja mieno.

“Ja multaj aferoj ne trovas lokon en libroj! Ankaŭ la grandskala produktado de fero kaj ŝtalo fare de la tuta popolo ne aperis en la libroj!” Respondis la sekretario ridetante.

“Por kio estas necese la vaporo? Kial ĝi estas nemankigebla? Se vi trovas la kaŭzon de tio, vi trovas ankaŭ la solvon de la problemo.” Aldone rimarkigis la sekretario.

Nun la kapo de Hu Hiaŭ-ven pliklariĝis kaj li denove komencis sian studon. Li ektrovis poste ke la gaso eksplodas miksite kun aero, kaj pro tio estas necese enkonduki unue vaporon, kiu, per sia premforto, elpremas la aeron. . . . Do, se la premforto de la gaso estas pligrandigita, ĉu ĝi ne povas elpremi la aeron per si mem? Lumo ekaperis en lia kapo, kaj li senprokraste sciigis al la sekretario sian eltrovon. Kun la subteno de la sekretario, li restudis

Monto-translokigo kaj Mar-kreado

Lignogravuraĵo de Vang Ki



longan tempon kun siaj kamaradoj. Fine, estis aplikata kaj bone sukcesis.

Post kelka tempo, la sekretario diris al Hu:

“Verku, junulo! Ĉu vi ne plendis ke en la libroj vi ne trovas la solvon? Se vian sperton vi skribos, la solvo de tiu problemo aperos do en libro.”

“Tiel, la libro estis verkita!” Mia kuniranto finis sian rakonton kaj ekvingis ĝin antaŭ mi.

La tempo pasis nerimarkite, kaj ni jam atingis la fergisejon, kie min surprizis antaŭ ĉio la montsimila amaso da ferpecoj. Mi ekkriis:

“Tiom multe . . . Ĉu ĉiuj estas fanditaj de vi?”

“Jes. La ŝtato jam forportigis grandan kvanton, sume la tuto egalas al kvinoblo de tiu ĉi amaso.”

“Ĉu bona estas la kvalito?”

“Tre bona, unuaklasa, senescepte. En la lastaj du monatoj, pluraj miloj da tunoj estis eĉ eksportitaj eksterlanden!” Li montris al mi la altforon, super kiu flirtis freŝe ruĝa flago, kaj aldonis: “Tiu estas la forno de ruĝa flago, ĉe kiu laboras Hu Hiaŭ-ven.”

Mi turnis tien mian rigardon. Ĝuste en tiu momento el la forno komencis elverŝiĝi la gisita fero. La ruĝa ferfluo kaj la ruĝa flago formis kune bildon ege admirindan.

Mi adiaŭis la junulon kaj rerigardis la flirtantan ruĝan flagon, pensante: “Post finaranĝo de miaj aferoj, mi nepre iros babili kun Hu Hiaŭ-ven.”

* *T. e. de loko, personaro, fornogrupo, fnotipo kaj gvido.*

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Lanĝoŭ-Hingiang-a Fervojo funkcias ĝis Hami

La fervojo inter Lanĝoŭ kaj Hingiang jam malfermiĝis al trafiko ĝis Hami en Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, antaŭvespere de la novjaro de 1960.

Tio radikale ŝanĝis la fizionomion de komunikado kaj transportado de Hingiang, kreis pli favorajn kondiĉojn por tiea konstruado kaj ankoraŭ pli intimigis la interligiĝon inter ĉiuj naciaĵoj de la aŭtonoma regiono kaj la tutlanda popolo. La inaŭguran solenon partoprenis 20 mil homoj el ĉiuj nacioj en Hami kaj la reprezentantoj el diversaj lokoj de sude kaj norde de Tiansan-montaro.

Nun la fervojo etendiĝas jam je 186 km. en Hingiang kaj la funkcianta parto longas 1315 km. Ĝis Urumĉi restas nur 500 km. Kaj la konstruaj laboroj en tiu parto iras nun ankaŭ plenvapore.

Hidroelektrejo utiliganta subteran torenton

Hidroelektrejo, kiu utiligas subteran fonton finkonstruiĝis unuafoje en nia lando je la fino de 1959. La hidroelektrejo troviĝas proksime al la groto Liulangdong en Kiubej-gubernio, Junnan-provinco, kiu estas elfluejo de subtera rivero, kies fluejo ampleksas ĉ. 2800 kvadratajn km. Ĝia

fonto troviĝas en alta ebenejo ĉirkaŭata de basenoj, kie abundas kalkŝtonoj. La karstoj (akvoeroziitaj kalkogrottoj) evoluigis en formoj de tunelo, puto k. s. La subtera akvo tra tri ĉefaj karstaj subteraj fluejoj venis al la groto Liulangdong, kaj tiam elfluas sub la ĉielon en la riveron Nanpan-rivero, 5 km. for de la groto, kun niveldiferenco de 104 metroj. La groto mem estas natura akvorezervejo kun kapacito de cent kelkdek mil kubmetroj. La elektrejo produktas jare 160,000,000 kv.-horoj de elektra energio kaj ŝparas por la ŝtato pli ol 80,000 tunojn da karbo. La konstruado komenciĝis en marto de 1958, kun helpo de Sovetiaj kaj ĉeĥoslovakaj specialistoj.

Mekanikigo de porko-bredado

Dum leviĝo de la teknika revolucio en Ĉinio, pli ol 150 instruistoj, studentoj kaj laboristoj de la Fakultato de Agrikulturaj Maŝinoj, Eksperimenta Farmo kaj Fakultato de Bestbredado kaj Bestkuracado de la Nordorienta Agrikultura Universitato partoprenis en la laboroj de projektado kaj konstruado en la mekanikigo de porko-bredado, kaj jam pretigis mekanikan linion de porkobredado.

Tiu ĉi mekanika linio ligas tri partojn: preparejo de furaĝo,

mangejo por porkinoj kaj grasiĝejoj de porkoj, ĉe kiuj de prilaboro kaj preparo de furaĝo, donado de manĝo kaj akvo, ĝis purigo de staloj ktp., jam estas mekanikigitaj.

Dank' al tio ĉiu homo nun povas bredi 2000 ĝis 2500 porkojn, t. e. 20-oble pli multe ol en la pasinteco, kun jara cirkulkvanto de 3000 ĝis 3750 porkoj kaj viandprodukto de 210 tunoj. La furaĝprilaborejo antaŭe por 5600 porkoj, povas nun prilabori furaĝon por 10,000 porkoj. Kaj la personaro reduktiĝis de 7 ĝis 2 homoj. Cetere ankaŭ multe reduktiĝis iliaj korpaj laboroj kaj kosto de viandprodukto. Tio malfermis al ni vastan vojon por amasa porkobredado kaj solvo de la problemo de porkajoliverado.



ESPERANTO MARŜAS



La 15-an de dec. 1959 pli ol 700 personoj ĉeestis la solenan vesperkunvenon aranĝitan de la Korea Esperanto Asocio honore al la 100-jara datreveno de la naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof en Pjengjang. La foto prezentas parton de la prezidantaro de la solena vesperkunveno. (Detalan informon legu sur p. 45 en n-ro 1 de E. P. Ĉ.)

TEKA. Reviglas!

Dum la Jubilea Kongreso en Varsovio okazis 4. aŭg. 1959 kunveno de kuracistaj esperantistoj. Ĉeestis 38 gekuracistoj el 10 landoj.

Oni decidis revigligi la agadon de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA), kaj en ĉiu lando aparte pere de ĝia Esp-a Estraro: 1) volontigi kuracistojn, apotekistojn ktp. al lernado de Esp-o; 2) stimuli la jam aliĝintajn kuracistojn al kunlaboro kun TEKA; 3) konstante enkonduki Esp-on en profesiajn landajn revuojn kiel lingvon de resumoj; 4) enkonduki Esp-on kiel lingvon de tradukado de internaciaj medicinaj kongresaj prelegoj; 5) starigi landan centron de resumoj

de ĉiuj fakaj artikoloj dissendotaj al ĉiuj Sekcioj de Kuracistoj en diversaj landoj.

La konstanta adr. de TEKA.-Sekretariejo estas Dr. Maria Jarnuszkiewicz, Pollando, Krakovo, str. Mazowiecka 69.

Oni petas 1) sendi nomaron kaj adresojn de kuracistoj kiuj volas aliĝi al TEKA. kaj aboni "Medicinan Revuon"; 2) sendi por la revuo interesajn, presindajn artikolojn de medicina fako, al ĝia Redakcio: Prof. D-ro Masao Suzuki, Tiba, Japanujo, 1-a Fiziologia Instituto, Medicina Fakultato, Tiba Universitato; 3) kunlaboron pri ampleksa medicina vortaro Esp-a (se eble multlingva). Adresu ĉion koncernan al Dr. Andreo Albault (fakdelegito de

UEA.), Toulouse, Francujo, 8 Avenue Étienne Billières; 4) kunlaboron pri la laboro speciale sanitara kun S-ro Josef Ambroz (Vic-prez. de Ĉeĥoslovakaj invalidoj) loĝ. Brno-Zidenice, str. Spackova 3, ĈSR; 5) por ekspozicio de medicinaj vortaroj, de originalaj kaj tradukitaj verkoj, libroj, artikoloj kaj skribajoj koncerne medicinajn temojn sendi ilin al la Sekretariejo kontraŭ konvena rekompenco; 6) ke ĉiuj esperantistoj kiuj havas iajn materialojn eĉ informojn pri la ĝisnuna agado de TEKA kaj pri ĝiaj funkciuloj en siaj landoj, sendu ilin al la Sekretariejo; 7) Ĉijare okazos en Bruselo dum la Universala Kongreso la Jubilea fakkunveno de kuracistaro (30a datreveno de TEKA.-fandiĝo) la Estraro de TEKA. kore invitas ĉiujn gekuracistojn partopreni la Kongreson.

La Loka Kongresa Komitato de T.E.J.O. faras inviton

La 16-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO.) okazos 23-30 julio 1960 en Rotterdam, Nederlando.

Ĝi invitas junajn geesperantistojn al tiu ĉi samtempe instrua kaj gaja kongreso, kies programo konsistas el tuttaga ŝipekskurso al la grandioza hidraŭlika ĉefverko, la "Delta-Projekto", vizito al la internacia ekspozicio (hortikultura) FLORIADE, kulturaj prelegoj, sportaj konkursoj, labor-kunsidoj ktp.

Kotizoj (inkluzive ĉiujn manĝojn, la dormadon en komuna loĝejo kaj ĉiujn kongresajn aranĝojn por membroj de TEJO):

	ĝis 1. 4. 1960
malpli ol 20-jaraj	70 ned. guld.
pli ol 20-jaraj	75 ned. guld.
	ĝis 1. 7. 1960
malpli ol 20-jaraj	75 ned. guld.
pli ol 20-jaraj	80 ned. guld.

Nemembroj de TEJO devas pagi 4 ned. guld. pli.

Korespondadreso: Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Ĝiaj perantoj ankaŭ troviĝas en Britujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Svislando kaj Svedujo.

Strato inaŭgurita per nomo Esperanto en Campinas, Brazilo

La 18-an dec. 1959—Zamenhofjaro—la urbestro de Campinas S-ro Jose Nicolau Ludĝero Mazeli subskribis leĝon kiu donis la nomon Esperanto al la urba strato. En la 24-a jan. 1960, Campinas Esperanto Grupo solene festis la inaŭguron de la nomtabulo de strato Esperanto.

La ceremonion partoprenis gesanoj alvenintaj de la ĉefurbo S. Paŭlo k. a. urboj. Ankaŭ multaj kulturaj asocioj de Campinas sin prezentis al ĝi. Dum la inaŭguro parolis s-ro Oskar Hoff kiel prez. de Campinas Esperanto Grupo, s-ro Kolonelo Candido Bravo, prez. de S. Paŭlo Esperanta Klubo.



Inaŭguro de la strato Esperanto en Campinas

F-ino M. Hoff reprezentante la prez. de Brazila Esperanto Ligo detiris la Brazilan flagon, kiu kovris la tabulon; dume la muzikistaro ludis festan muzikon.

Pli ol 450 kolomboj estis liberigitaj post la solena inaŭguro de

la nomtabulo. La partoprenantoj ankaŭ vizitis fotoekspozicion invitite de Foto Cine klubo kaj malgrandan Esp-an ekspozicion aranĝitan en la montra fenestro de magazeno en la centro de la urbo.



Sur Nia Librobreto

Sonĝe sub Pomarbo—Triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj de Julio Baghy. Antaŭparolo de Marjorie Boulton. Kun portreto de la aŭtoro kaj kvar dekoracioj de Stefano Barta. Broŝurita kun formato 16 × 22 cm. 232 paĝoj. Eld.: J. Régulo Pérez, La Laguna, Kanariaj Insuloj. 1958, Prezo: 1.80 Usonaj dolaroj plus sendkostoj.

Jen la plej grava verko de Julio Baghy post la apero de lia granda romano "Hura!" Ĝi estas, oni povas diri, io inter "La Sonĝo de Mezsomera Nokto" kaj "La Nokto de Walpurgis", aŭ, pli precize, la du

miksita. 17-jara vaganta studento Adamo renkontiĝis kun Eva, la 17-jara nepino de arbaristo apud sia arbara domo, kaj post interŝanĝo de kelkaj incitaj kaj petolemaj vortoj, ili ekenamiĝis. Kiam la nokto alvenis, Eva ŝteliĝis el sia ĉambro kaj pasigis la nokton, sidante kune kun Adamo sur benko sub pomarbo antaŭ ŝia fenestro, ambaŭ vindite en granda tuko de la avino. Ensonĝe ili estis tentitaj de la arbaraj spiritoj al la krimo manĝi el la pomo de la arbo de vivo pro sia arda deziro por eterna juneco kaj submetis sin al

la puno "vidi Vivon preterkure sen eblo agi en la Esto nura, ĉar Penson ne plu sekvos la Plenumo."

Post svatsceno de la fantazikreita figuro Kazimiro ĉe la geavoj kaj ilia senforta protesto, niaj geheroj ektrovis sin inter la "teknokratoj", tio estas, la maŝinhomidoj (miloj da miljaroj jam pasis!) Jen disvolviĝas vere trista bildo de la homa estonto. Tiam la scienco jam venkis spacon kaj tempon, oni povas vidi sur ekrano la vivon de aliaj planedoj, la estontecon kaj la estintecon de la homa mondo. Sed kiaj estos la tiamaj homidoj, alie nomite, la teknokratoj!

*Senseksaj ili senton eĉ ne konas,
La grandan cerbon nur ciferoj
spronas.*

*En tiu cerb' giganta mankas ĉeloj
por la pasio, sentoj, foraj celoj.*
Tiel la ĉiam bonhumora homa-

manta poeto ekfariĝas pesimisma profeto, kiu antaŭdiras la estonton de la homaro, ĉiam antaŭenŝovanta la sciencan seniginte al si la amsenton.

*Principo stulta "ĉion por potenco!"
detruiĝis per la povo de 1' scienco
la vivon mem sur Tero. Jen fine
fine
pereis la Homaro. . .*

La filmo montras al ni la lastan aspekton de la tero. Dezerta pejzaĝo, ĉie regas la mortinta naturo, escepte de du verdaj folioj sur maldika branĉeto de iu ŝtoniĝinta arbostumpo kiel sola vivsigno spite al la morto. Tiuj du folioj ekvekis en ili la memoron pri la estinteco. Ili revokas la faŭnon, unu el la arbspiritoj longe neniiĝintaj kune kun la homraso. Laŭ ĝia instruado, ili eltrinkas du glutajn da akvo el la fonto de la Morto kaj la sorĉo tuj rompiĝas. La geherooj estas reportitaj al la reala mondo.

Vasta koncepto, profunda penso kaj perfekta drameca ellaboro. En tiu ĉi verko, la genia poeto kaj humora satiristo estas en sia plena florado. Multaj paragrafoj igas la leganton pripensi kaj ankaŭ multaj bonhumoraj scenejoj restos la

plej bonaj humorajoj de nia literaturo. Kiu ja povus ne ĝui la amuzajn scenojn pri la kverelo inter la geavoj kaj la svatado de Kazimiro (mi citas nur hazarde) La majstreco de la poeto ankaŭ montriĝas en tio, ke li preskaŭ elĉerpis ĉiujn eblajn rimedojn de la Esperanta versfarado kaj multe disvolvas la versarton de Esperanto. Sed, ĉu ne estas superflue numeri ĉiujn meritojn de tiel fama poeto?

Laŭ la diro de la aŭtoro, la komedion li verkis "por rifuĝi el anima kaj nervmuela angoro dum la morna historia tempo en vintro de 1956-1957". Tamen, ĉu ekzistas rifuĝejo el la kruela klasbatalo, kiu finiĝos nur per la fina foriĝo de la klasoj? Mondpacon oni ne povas atendi kun falditaj manoj kaj ĉiun colon de la edeno devas konkerti per forto. Nun la inkubo de tiu morna vintro jam disvaporigis kaj sub la gvido de la Hungara Socialisma Laborista Partio, la hungara popolo jam reviviĝis el la fajrbano kiel fenikso kaj rekonstruas kun plenvaporsian patrujon, kiu estos centoble pli bela ol la antaŭa. Do oni ne havas kaŭzon malesperi

antaŭ la kruda realo. Mi esperas, ke nia multe admirata poeto iam kantos plenvoĉe al ni la gloran epopeon de la hungara popolo en la konstruado de sia socialisma patrujo.

S. J.

Maria Ziolkowska: Doktoro Esperanto — Biografia verko pri D-ro L. L. Zamenhof, eldonita paralele en du lingvoj (Esperantopola) okaze de la 44-a U. K. en Varsovio. La Esperantan tradukon faris s-ano Isaj Dratwer. Krom 332 paĝoj de Esperanta kaj pola tekstoj oni ankaŭ plezure vidis en ĝi 16 paĝojn da ilustraĵoj. Formato: 13 × 20.5 cm. kun plaĉa tolbindo. Eldonis: "Wiedza Powszechna", ul. Jasna 26, Warszawa, Pollando. Prezo: 25 zlotoj.

Post la apero de "Originala Verkaro", "Leteroj de L. L. Zamenhof" kaj pluraj artikoloj pri la iniciatinto de Esperanto oni ĉiam atendas ampleksan kaj kompletan biografian verkon pri D-ro Zamenhof ol tiu de E. Privat verkita jam antaŭ 40 jaroj. "D-ro Esperanto" ankoraŭ ne estas verkita, tamen iomgrade ĝi kontentigas tiun sopiron. Ĉar el multaj verkoj kaj dokumentoj la verkintino ĉerpis necesajn materialojn por teksti la sian. Ĝi dividiĝas en 9 ĉapitrojn. La legantoj povas el tiu ĉi konciza verko iom pli kompreni la vivon, laborojn kaj ideon de D-ro Zamenhof. Por vivi la verkon, la verkintino rearanĝis la materialojn tiamaniere, ke la verko legiĝas kvazaŭ romano. Tio certe interesos la legantojn. Oni nur miras, ke iuloke enŝoviĝis fikcia persono. Ŝajnas al mi, ke tia metodo ne tre konvenas por biografiaj verkoj, ĉar oni ĉiam devas konsulti la piednotojn ĉu la rakontitaj faktoj estas aŭtentikaj aŭ ne. Oni sentas mankon ankaŭ en tio, ke la libro nur rakontas tion, kio okazis al D-ro Zamenhof kaj nenion analizas kaj kritikas laŭ socialisma vidpunkto por montri kion oni devas heredi de li kaj kion ne. Ĉar liaj ideoj estas bonvolaj, sed ege limigitaj de lia vivo kaj mondkoncepto, kaj ne tiom

Protesto

Estimata redaktoro:

Kiam ni informiĝis ke la Internacia Astronomia Asocio jam kontraŭleĝe akceptis la delegacion de la Tajvan-a Kuomintang-reakciularo, kiel astronomiaj laborantoj de Ĉinio, ni tre koleras kaj forte protestas ĉi tion, ĉar tia al ni neamika ago de la Internacia Astronomia Asocio estas intrigo por "fari du Ĉiniojn", kaj ni tutkore subtenas ke la Ĉina Astronomia Asocio prave eliĝis el la Internacia Astronomia Asocio.

Ni premas viajn manojn.

Kamarade viaj

Ĉoŭ Juan

Lu Ŝen-ton

Pekina Astronomia Observatorio

senriproĉaj kiel liaj laboroj pri internacia lingvo. En la nuna jarcento, kiam la nacioj en la socialismaj landoj plene ĝuas egal-econ kaj tiuj ankoraŭ subpremat-jam trovis aŭ pli-malpli frue trovos ĝustan vojon por la liberiĝo, oni ja neniel devas ankoraŭ nur ripetadi la revon de D-ro Zamenhof kaj bedaŭri la tragedian sed neevitablan malsukceson de liaj ideoj. Fake la historio jam faris tre klaran kaj justan juĝon pri D-ro Zamenhof, ke lian laboron pri internacia lingvo la mondo akceptas kaj disvolvas, sed lia revo kaj la vojo por efektiviĝi la revon restas senutilaj kaj ignorataj de la veraj batalantoj por liberiĝo kaj egalrajteco de la nacioj. Ĉu en la studo de D-ro Zamenhof ni ne devas akcepti la instruon de la historio?

La Esperanta traduko estas klara kaj flua. Nur en kelkaj lokoj ŝoviĝis prezeraroj kaj polismo.

H. F.

Pollando—Mallongaj informoj pri geografio, historio kaj kulturo eltiritaj el "Malgranda Universala Enciklopedio de PWN (Pola Scienco Eldonejo, Miodowa 10, Warszawa, Pollando). En ĝi troviĝas 17 artikoloj, 16 paĝoj de belaj ilustraĵoj kaj unu multakolora mapo. 13. × 20 cm., tole bindita. La artikoloj kvankam dise kolektitaj donas kune plenan bildon pri Pollando de historio ĝis la nuna progreso, de politiko ĝis kulturo. Eldonaĵo utila, laŭdinda kaj imitenda por multaj landoj.

Polaj Okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj — Broŝuro 44-paĝa eldonita de Zachodnia Agencja Prasowa por klarigi la historion, kul-

turon kaj leĝan bazon de tiuj teritorioj. Tiuj klarigoj forte batas la absurdajn kriojn de Adenaueristoj kaj postvivantaj naziistoj.

Pulĉinelo — Esperanta konstrua vortludo, 2-6 personoj povas per la 720 kartetoj ludi diversmaniere. Tre interesa elpensajo. Ĝi certe povas multe vigligi la esperantistajn vesperojn. Akirebla ĉe "Esperanto Press", Oakville, Ontario, Kanado. Prezo neindikita.



Korespondi Deziras



* **Dek ĉeĥaj s-anoj** dez. kor. kun diversaj landoj pri ĉ. t. Skribu al Josef Šelbický, Debr' ĉ. 237, Mladá Boleslav, Ĉeĥoslovakio. Resp. garantiata.

* **Bánáti István**, Békéscasaba, I. Bánát u. 26, Hungarujo, dez. kor. kun ges-anoj el Ĉinio por interŝ. bk. kaj naciaĵoj.

* **Francisko Lendvai**, Badacsonytomaj, Hungario, dez. kor. kaj interŝ. pm. kun Aziaj, Aŭstraliaj kaj Afrikaj esp-istoj.

* **F-ino Graciela Sellán**, Paraguay 1930, Rosario, Argentino, dez. kor. kun s-anoj el Ĉinio, Sovetio kaj Japanio kaj interŝ. fotojn kaj pk.

* **F-ino Teresita Garzón**, Güemes 1169, La Carlota, Córdoba, Argentino, dez. kor. kun geesp-istoj el tutmondo kaj kolektas pm. kaj pk.

* S-ro **Juan Raúl Jurado**, lè de Mayo 2258, Rosario, Argentino, dez. kor. kaj interŝ. pk kaj pm. kun tutmondo.

* S-ro **Horacio Núñez Regueiro**, Pte. Roca 1754, Rosario, Argentino, dez. interŝ. pk kaj alometetikadojn k. ĉ. l., precipe kun Azio.

* **Ĉerný Václav**, Poste-restante, Pardubice 1., Ĉeĥoslovakio, 35-jara elektrospecialisto, dez. kor. kun ges-anoj el Azio pri diversaj popolaj demandoj, interŝ. kolorajn pk kaj por lerni ĉinan lingvon.

* **Juna arkitekto** dez. kor. kaj interŝ. bk: Jan Kalný, Do Lesek 26, Znojmo, Ĉeĥoslovakio.

* **K. Matuba**, Huzimityô 3-82, Yokosuka, Japanio, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj pri lingvoj, literaturo, matematiko kaj edukado.

* **Yamaguti Kazumasa**, Tokio, Sumida-ku, Higasi-Komagata 3-24, Japanio (32-jara aŭtlaboristo) dez. kor. kun ĉinaj gek-doĵ precipe pri pacmovado, kaj socialismo.

* **S-ro Dinh-Thuân-My**, B. P. 482-phnompenh, Kamboĝo dez. interŝ. p.m. kun gekolektantoj en Ĉinio.

Gancò M. Radkinov, ul. "Kapitan Nikola" no. 23, Gabrovo, Bulgario, dez. kor. kun Aziaj landoj.

Korespondantojn serĉas **Vlastimil Řezníček**, Revoluĉni 21, Horni Mošténice u Přerova, Morava, Ĉeĥoslovakio.

Stefan P. Stojanov, Aprilov, Gabrovsko, Bulgario, dez. kor. kun tuta mondo per bk.

František Dvořák, Albrechtice n./Vlt. 88, Ĉeĥoslovakio, 15-jara lernanto dez. kor. kun tutmondo kaj kolektas unuataĝajn kovertojn, pm kaj pk.

Ĵelju Simeonov Mihajlov, Str. Oktobro no. 9, Kazanlâk, Bulgario, 23-jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉ. t.

Makmur A. Guru P. G. A. P., Tandjungpandan (Billiton), Indo-

nesia, dez. kor. kun lernantoj de tuta mondo.

Minoru Ichihara, 38, 2-chome, Onden, Sibuya-ku, Tokyo, Japanio, dez. kor. kun ĉinaj filatelistoj.

Takumi Tada syôzui aizumityo, Tokusima-ken, Japanio, 27-jara instruisto, dez. kor. pri lokaj okazajoj kaj interes. ĉiuspecaj bildgazetoj.

* Kun orientaj kaj aliaj artpen-tristoj deziras korespondi pri la fakaj aferoj: **Sro Mauri Faven**, Mikkolantie 5, OULUNKLÄ, Finnlando.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, **k-dino Hoang-Minh-Phung**, 7a Cat-Linh, Hanoj, Vietnamio.

* **Germinio Teixeira**, R. Guarani, 387, Belo Horizonte — Minas, Brazilo, dez. kor. kun ĉinaj kaj eŭropaj ges-anoj per il. pk. kaj leteroj.

* **Lernejoj instruistoj** estas kunvokataj partopreni la internacian lernantan gazeton "Grajnoj en Vento", rondcentro Polski Trambes, Târnovsko, Bulgario. Pluajn informojn donas: Hristo Manolov, direktoro de Polski Trambes.

* **40 geknaboj 12-15-jaraj** dez. kor. kaj interes. kun tutmondo. Skribu al instruisto: Gèza Gyurkovits, Budapest 4 ker. Ujpest Némethy u. 7, Hungario.

* **15 gelernantoj 15-18-jaraj** kaj 3 instruistoj de ekonomia teknikumo dez. kor. kaj interes. il. pk. kun ĉinaj gelernantoj. Skribu al la instruisto Penço Petrov, Ikonomia Teknikumo "Vasil Levski", Plovdiv, Bulgario.

* **30 gestudentoj de industria lernejo** dez. kor. kun la tuta mondo kaj interes. diversajojn. Certe respondos. Adreso: Prŭmyslová škola, Karviná VI, Ĉeĥoslovakio.

* **Călăuz Laurentiu**, str. A. S. Popov no. 29, Bucuresti 12, Rumanio, prof. 26-jara dez. kor. kun gejunuloj de la tuta mondo, precipe kun la Aziaj, pri ĉiuj temoj kaj interes. pm. kaj il. pk.



Finredaktinte

Du jaroj jam pasis depost la reeldoniĝo de nia revuo. Ni estas tre dankemaj al la legantoj, kiuj senĉese nin honoras per kuraĝigoj, laŭdoj kaj proponoj. Multaj veteranaj esp-istoj skribis al ni longajn leterojn pritraktante pri la enhavo aŭ lingvaĵo de nia revuo, por ke nia gazeto fariĝu pli kontentiga al la legantoj. Malgraŭ tio, kontrolinte la laboron dume faritan, ni ne povas ne konstati kun bedaŭro ke nia revuo ne estas tiom bone kaj tiom kontentige redaktita, kiom oni rajtas esperi. Ni trovis, ke enhave ni ne tiom sisteme konigis al niaj legantoj la aktualan staton de nia lando sufiĉe reliefigante ĝiajn esencajn trajtojn, por ke ili povu pli klare formi al si bildon de nia lando kaj popolo. Pri la teknika aranĝo kaj ilustrado de la revuo, ni ankaŭ ne vestis ĝin kiel eble plej bele kaj plej artisme. Tion kaŭzis unuflanke la limigiteco de nia kapablo, aliflanke en multaj okazoj ankaŭ de tio, ke ni ne sufiĉe klopodis por plene utiligi niajn rimedojn kaj eblecojn. Tial ni provas ŝanĝi la ĝisnunan staton alprenante kelkajn novigojn en tiuj ĉi rilatoj, por ke nia revuo povu pli bone kontentigi niajn legantojn. Ni petas, ke vi daŭre sendu al ni kiel antaŭe viajn valorajn opiniojn kaj rimarkigojn, al kiuj ni estos ĉiam elkore dankemaj.

Kompare malgranda spaco de nia revuo estis dediĉata al Esperanto kaj ĝia movado. Tio ne montras, ke ni ne havas intereson en ili. Ni nur pensas, ke nova afero kia Esperanto ne povas esti daŭre propagandata per nuraj vortoj. Esperanto havas historion de pli ol 70 jaroj kaj jam eniris stadion de praktika uzado. Ĝin uzi vaste kaj serioze estas ja plej efika propagando. La unika aktuala tasko de la lingvo Esperanto devas esti akceli la reciprokan aprezon de kulturaj trezoroj kaj intelektan intersanĝon inter diversaj landoj tra la tuta mondo por tiel ebligi la reciprokan komprenon inter la popoloj. Tio ja havas speciale gravan signifon en la nuna momento. Kial, do ne ŝarĝu ĝin ĝuste per tio?

Ĉinio jam akiris en sia ekonomia konstruado dum la lastaj du jaroj tre grandan sukceson. Kia ĝi efektive estas, informas la legantojn la artikolo: "La Grandioza signifo de 3-jare pli frua plenumiĝo de l' Dua Kvinjara Plano". Ekde la leviĝo de la kampanjo de popola komunumo en niaj vilaĝoj, jam multe disvolviĝis la sistemo de popola komunumo. La fakto pruvis, ke kun paso de la tempo, ĉiam pli klare montriĝas ĝiaj avantaĝoj. Ĝi jam fariĝis la fokuso de tutmonda atento inkluzive de niaj legantoj. Tial ni decidas raporti pri ĝi sur paĝoj de nia revuo el diversaj vidanguloj por ke la legantoj formu el ili plenan bildon pri la afero.

Krome, la kontraktado de reciproke neagresa traktato kaj la interkonsento pri la landlimproblemo inter Ĉinio kaj Birmo, kiun aplaŭdas la pacamantaj popoloj de la mondo havas grandan signifon por paco en Azio. Pri tiu temo eksplikas al ni la artikolo de ĉina veterana ĵurnalisto Vang Jun-ŝeng en tiu ĉi numero. Nun la Hindia ĉefministro Nehru akceptis jam la ideon de nia Ĉefministro Ĝoŭ En-laj pri interparolo inter la du ĉefministroj kiu okazos en aprilo. Kaj la Nepala Ĉefministro Koirala ĵus faris viziton al nia lando, kiu multe plifortigis la delonge ekzistantan tre amikan rilaton inter niaj du najbaraj landoj, kiun ĝenis neniaj disputoj ĝis nun. Ĉio ĉi tio bone montras ke la ĉina popolo estas pacamanta, kaj ĉiam klopodas konservi amikan rilaton kun siaj najbaroj. Tio ja estas fakto, absolute ne neniigebla per la mensogoj kaj kalumnioj de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj.



La Popola Halo altiras al si la korojn de la 650.000.000 ĉinaj popoloj.

La Bankeda Salone de la Popola Halo povas disponigi sidlokojn al 8.000 festantoj.

Fotoj de Lan Kong

定里北在河...
红溪二江...
一九五...
一九五...
一九五...

春利农村



UNIVERSITY OF TORONTO